83 -a SAT - Kongreso 1 - 6 aŭgusto 2010 Braŝovo - Rumanio


"Ekonomia krizo - Kiam la venonta?"

# Sennaciulo

Sennaciulo estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org/
majo - junio 2010, n-ro 5 -6 ( 1259 - 1260 )



**Nia dosiero** - **G**enetike **M**odifitaj **O**rganismoj


UNUA DE MAJO
INTERNACIA
LABORISTA TAGO
Ni daŭrigu la lukton
Major demonstrations in: Atlanta, Chicago, Detroit, Los Angeles, New York City, San Francisco Bay Area, Washington, D.C.
other areas contact:
National May Day Committee
P. O. Box 12039
Detroit MI 48212
(313) 893-8350, (313) 893-7831

# Enhavo

p- 4. Ĉu GMO aŭ ne GMO.
p- 9. Starpunktoj kaj kroniko de Ekologiisma Frakcio.
p-11. Transgenaj terpomoj por produkti paperon kaj gluaĵon.
p-13. Baza principo.
p-14. Plibonigoj
p-15. Genetike Modifitaj Organismoj.
p-19. SAT-Kongreso. Iom da kulturo.
p-21. Letero al ĉefministro.
p-22. Pri Haitio.
p-23. Ekzistas kaŝita agadplano.
p-26. Kontraŭ G20 Pinta konferenco.
p-28. Ĉu preterpasi la kapitalismon per ekonomia demokratio.
p-29. Donacoj al SAT
p-29. Komunista Frakcio.
p-30. Ĉu pri kongresoj kaj klasbataloj.
p-32. Leteroj kaj opinioj de legantoj.
p-33. Informo pri SAT-Kongreso en Braŝovo.
p-34. Liberecana Frakcio.
p-34. Himno al Semo.
p-35. Aventuroj de okjarulo.
p-36. Raporto de la Plenum-Komitato.
p-41. Homa ponto inter kulturoj.
p-43. Tsunagu-kabe - Kunliga muro. Pri Keiko Miyamori.

## Nekrologo

La 25an de januaro mortis en Gummersbach (DE) 80-jara
k-dino Helga CONZETH (matr. 28507).
Ŝi devenis el Eo-familio kaj ŝiaj gepatroj, gek-doj Killmer, ankaŭ siatempe estis aktivaj membroj de SAT. Mallonga biografio pri ŝi aperis en la libro "Esperanto-ein Ausweg aus Babylon? 95-Jahre Esperanto in Düsseldorf", eld. Videel, 2002.
Ni kondolencas al la familianoj kaj amikoj

**Sennaciulo**
**Oficiala organo de S.A.T.**

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.;
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Plenum-Komitato de SAT:
Prezidanto: Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario: Vinko Markovo
Kasistino: Thérèse Sabatier
Membroj: Guy Cavalier, Stefano Herve Gérard Lieblang, Franjo Leveque-Provost, Arturo Prent.

Redakta Komitato - Kreŝo Barkoviĉ, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Cindy McKee, Viola Murasaki, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Franciska Toubale. Enpaĝigas Jakvo.
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T..
Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 15-a de junio 2010.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel.
Le directeur de la Publication: Jacques Bannier;
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

## Novaliĝoj

35923 BALLESTEROS Victor Angel, Tiburcio Benegas 1864 ciudad Capital AR-CP 5500 MENDOZA, Argentinio
35924 BUDAGJAN Erdgard, Poŝte restante, RU-117449 MOSKVA, Rusio
35925 KIM Yeongsil (Kenzzang) Doosan villat D-dong 101 ho, Yeokgok1-dong, 243-26, Wonmi-gu, Bucheon-si, Geyonggi-do, KR420-833 SEOUL, Koreio

Alain Cavelier

# Ĉu GMO aŭ ne GMO ?

## Maltrafa demando !

Jen tamen la nuna demando de centmilionoj da homoj tra la mondo antaŭ la komerca, gazeta kaj politika ondego, kiu fordronigas tiun sciencan, ekonomian kaj moralan aferon en la kloakajn ŝaŭmojn de proksimumo kaj kontraŭvereco. Certe Monda Fonduso ne financos tiel frue projekton kun produkto de GMO, sed la premo de la eksportistoj de la riĉaj regionoj sur la mondajn kamparanajn agrikulturojn fariĝos tia, ke evidentiĝas necese, ke ni alportu elementojn por klarigado kaj pripensado al tiuj el ni, kiuj estos iliaj celoj. Do ni provos klarigi per du artikoloj, kial la demando estas maltrafa kaj kiel starigi sian opinion rilate al celoj kaj riskoj de tiu teknologia evoluo, kiu deziras revolucie aspekti.

Antaŭ kelkaj jaroj, kamparaj loĝantaroj de Kamerunio grave toksiĝis pro la konsumado de maniokaj nutraĵoj verŝajne mispreparitaj. Tio, ĉar la manioka tuberoso nature entenas fortegan toksaĵon, cianhidra acido, kies procenta enteno estas despli alta ke la kulturvario estas amara. Post preparado, la maniokaj pecoj aŭ farunoj ne devas enteni pli ol 0,015 % de tiu acido por esti manĝeblaj.

Kial ekzistas diversaj maniokaj varioj koncerne tiujn **karakterojn**: *amareco kaj procento de cianhidra acido*? Tio ĉar ekde multaj generacioj, la maniokokultivistoj iom post iom selektis per empiriaj metodoj specojn de tiuj tuberosoj, kiuj havas la "bonan karakteron" laŭ iliaj gustoj, sen havi la rimedojn identigi kaj mastri la "malbonan karakteron" ligitan al la ĉeesto de la tokso. Pli antaŭe la institutoj de esplorado kaj la privataj selektistoj komencis plirapidigi tiun selektadon pliampleksigante ĝin al aliaj interesaj karakteroj, kiel la *produktiveco* aŭ la *rezisteco kontraŭ la malsanoj*. La maniokistoj selektis ĉefe elektante la bonajn plantojn por uzi ilin kiel stamojn: ili kreis *tradiciajn* kulturvariojn. La esploristoj utiligas diversajn sciencajn metodojn de krucado inter tradiciaj varioj kaj naturaj populacioj por plej bone kunigi la interesajn karakterojn en aparta medio, kaj senigi la malutilajn karakterojn. Tiamaniere multiĝis laŭ la tempoj la maniokaj varioj, utiligeblaj en nombraj agronomiaj kondiĉoj kaj destinitaj al diversaj uzoj.
Kaj estas same por ĉiuj kultivataj plantoj tra la mondo! Kaj estas same por ĉiuj hejmaj bestoj en la mondo! Tio daŭras de antaŭ 10.000 jaroj, kiam niaj foraj prauloj komencis hejmigi la unuajn kultivatajn plantojn (Aegylops: la pra-tritiko-, pizoj, lentoj ) kaj la unuajn hejmajn bestojn (ŝafoj, kaproj ).

Ĉio estis selektata kaj plibonigata por kunigi la kvalitojn ( = aro da karakteroj) kiuj plej bone kontentigu la diversajn bezonojn de la konsumantoj kaj la gravaj postuloj de kultivado aŭ de bredado. Kaj tio daŭras, ĉar multaj progresoj restas farendaj: demandu niajn amikojn el la grupo Miwonovi (en Ĝankase, en Togolando) ĉu ili ne revas pri raso de kokinoj, kiuj produktus multajn grandajn ovojn manĝante malmulte sen malsaniĝi je birda pesto nek suferi pro varmbatoj; demandu niajn amikojn el la grupo Asocio de Junaj Bredistoj en Song-Naba (AJBS, Burkinio), kial ili preferis la lokan porkan rason por sukcesigi siajn "fornporkojn"; demandu la virinojn el la grupo Kvin-Fingroj en Hueto-Fifonsi, en Benino, ĉu ili estas kontentaj pri la manioka vario, kiun ili transformas en farunon kaj tapiokon?

Amareco, procenta enteno de cianhidra acido, produktiveco, rezisteco al la malsanoj, alklimatiĝo estas do la karakteroj, kiujn ĉiu povas taksi, kontroli, kaj eĉ per sciencaj metodoj, mezuri. Sed, se mi

konsideras ekzemple maniokan tuberoson, kie loĝas ĝia dolĉa aŭ amara karaktero? Kiel ĝi transdonas ĝin al la idoj?

Ĉiu karaktero loĝas en t.n. "genetika informejo" de la ĉelo. Ĉiuj estuloj konsistas el mikroskopaj ĉeloj, ekde unu sola (kiel la sangaj globetoj aŭ la bakterioj) ĝis pluraj milionoj (kiel vi kaj mi). Ĉiu ĉelo entenas kernon, kiu kunigas sub formo de genoj kunmetitaj en kromosomoj konsistigitaj el ADN, la tutan informaron el kiu povas rekonsistiĝi la tuta organismo. Ja tio okazas je la reprodukta momento. La ĉeloj kaj ties kernoj estas videblaj per okula mikroskopo. La kromosomoj kaj la genoj estas videblaj nur per potenca elektronika mikroskopo: tial oni malkovris ilin nur de malpli ol unu jarcento.

Karaktero estas ordonata de unu aŭ pluraj genoj. La selektado kaj la plibonigado, pri kiuj ni parolis pli supre okazas per la elekto de unuopuloj havantaj tiujn genojn aŭ per la transdono de tiuj genoj el vario de planto (aŭ de besta raso) al alia. Ĉiu-okaze temas pri manipulado, kiu modifas la genetikan informadon de tiuj estuloj.
Jen kial la GMO ("genetike modifitaj organismoj") neniel estas la produktoj de teknologia revolucio, ĉar ĉio kultiva aŭ breda, kio ekzistas sur la tero rezultas el la genetikaj modifoj faritaj de homo de 10.000 jaroj, kvankam oni konas la enajn mekanismojn nur de unu jarcento.

## Nu, se ĉio estas GMO, kio problemas? Trafa demando!

Sendube vi rimarkis en la pli supra teksto, ke la selektado de la karakteroj kaj ties transdonado neniam okazis trans la kadro de la speco: kokino por Miwonovi, porko por AJBS, manioko por Kvin-fingroj. Se oni bezonas malpliigi la procenton de cianhidra acido en manioko, oni prenas la utilajn genojn el aliaj kulturvarioj aŭ en naturaj maniokaj populacioj. Ne el tomato, agutio aŭ glosino. Nu la vera teknologia evoluo jenas: kiel de nun oni kapablas **vidi** la genojn per taŭgaj instrumentoj, same oni kapablas elpreni ilin el la preciza loko de la ĉela genetika materialo, same ankaŭ oni kapablas integri ilin en iun ajn fremdan ĉelon, kiuj ajn estas la koncernataj specioj. Tiam oni ekhavas **transgenajn organismojn**, termino multe pli taŭga ol "GMO" - Genetike Modifitaj Organismoj.

Tio estas ne tute nova. Per pure naturaj teknikoj homo jam evoluigis la genron *Aegylops* al la genro *Triticum*, kiu jam iras trans la limoj de la speco. Li ankaŭ kreis mulon kaj hinon (kruciĝoj el azena kaj ĉevala specoj), kaj tritikalon (kruciĝo el tritiko kaj sekalo). Kaj en tiuj kazoj, la manipulado koncernas ĉiujn karakterojn de tiuj estuloj, kaj ne etan nombron kiel en la nunaj transgenaj organismoj. El etika vidpunkto, neniam iu trovis ion por rediri.

Nu per laboratoriaj teknikoj oni povas de nun rapide integri en specojn karakterojn, kiuj antaŭe ne ĉeestis. Ekzemple oni jam ekhavis plantojn rezistajn kontraŭ insektoj kaj herbicidoj, plantojn pliriĉigitajn je vitaminoj, plantojn aŭ mikroorganismojn, kiuj produktas medikamentojn aŭ plastojn aŭ agronutrajn reagilojn, laboratoriajn bestojn, biologian materialon por scienca esplorado.

La plirapidiĝo estas kapturniga. En ĉiu el la aktivecoj ampleksitaj de transgenetiko (agrokultivado, besta kaj fiŝa bredado, farmacia, kemia, prinutra industrioj, medio) la eventualaj aplikadoj ŝajnas senlimaj.

Apriore transgenetiko evidentiĝas kiel nova instrumento pri scienca kono kun efikeco nekonata ĝis nun. Per si mem la kono estas ĉiam absoluta bono. Restas ekzamenende, kion faras homo el siaj konoj: tie ĉi oni eniras en la kampon de la aplikadoj, kiu ne plu estas la scienca sed la teknologia, kaj tio estas tute alia afero! Isaac Newton, kiu per sia scienco eltrovis en la 17a jarcento la leĝojn pri universala gravito estas je la origino de la balistika teknologio, kiu irigis homon en aeron kaj spacon. Sed ankaŭ sama teknologio terurege pligravigis la detruan povon de la armiloj.

## Ĉu GMO aŭ ne GMO? Maltrafa demando! (sekvo)

En Monda Solidareco numero 78, ni provis simplan klarigon pri transgenetiko por ekhavi opinion pri la problemo de la transgenetikaj organismoj, nomitaj "GMO" (genetike modifitaj organismoj). Hodiaŭ ni pasas de la **scienca kono**, kiu ebligas manipuli vivaĵon, al la **teknologia aplikado**, kiu rilatas al la uzado, kiun oni faras el tiu kono. Kaj tie aperas la perversioj... **Kial?**

Ni tuj diru, ke la ŝlosilo, kiu malfermas la rigardadon sur ĉio, kio sekvas estas jena: **transgenetiko multe kostas**! Multe kostas farscio, ekipoj, alĝustigoj, kontroloj.

Nu por pasi al teknologia stadio de grandskala produktado, necesas multege investi: nur

gravaj plurnaciaj societoj kun helpo de bankoj havas la rimedojn tion fari. Kaj fakte la tuta produktado de la transgenaj organismoj tra la mondo kuŝas nun inter la manoj de kvin el tiuj societoj. Tiuj ĉi ne estas, malgraŭ la reputacio, kiun ili serĉas ekhavi, homamaj societoj agadantaj por la bono de la homaro. Ilia celo estas unue estigi kiel eble plej rapide profitojn, sub la preteksto, ke por lanĉi novan produkton ili prenas riskon, kiu pravigas rapidan kompenson de la investoj.

Do ili serĉas agi rapide... **tro rapide**, ĉar el tio fluas serio da konsekvencoj, kiuj estas almenaŭ alarmigaj. Ni mallonge pristudos kelkajn, sciante ke la spaclimo de nia prezento devigas nin elekti la plej videblajn.

**1/ Kiu utileco**? La ĉefa demando laŭ ni, kaj la malpli traktita en la gazetaro jenas: transgenaj organismoj por kion fari? Alimaniere dirite, **kiujn novajn karakterojn** enigi en kiujn kultivatajn aŭ bredatajn variojn por **respondi al realaj bezonoj** kaj estigi senteblajn progresojn? Ĉu niaj mondfondusaj amikoj ne dezirus disponi pri varioj de pluva rizo kun alta rendimento, rezistaj al malsanoj kaj nematodoj? Aŭ pri varioj de maizo aŭ de fazeoloj rezistaj al sekeco aŭ al salhaveco? Aŭ pri varioj de ignamo aŭ de manioko riĉaj je nutraj proteinoj? Aŭ pri zebuaj rasoj, kiuj produktus multe da bona lakto? Certe, ĉu? Nu, proponojn de transgenetiko en tiu senco ĉu oni vidas? Ne! Ne sufiĉe profitodona... La fabrikistoj interesiĝas ĉefe al la "portantaj" merkatoj de la riĉaj regionoj modifante maizon, sojon, kolzon, tomaton, ktp. laŭ karakteroj, kiuj neniel rilatas al la bezonoj de la malriĉaj regionoj. La karikaturo de tiu konduto estas la kreado de kulturvarioj rezistaj al totala herbicido: tio reprezentas neniun plibonigon de la ekologiaj kapabloj aŭ eĉ de la koncernataj plantoj, sed tio certigas la ĝeneralan utiligon de tiu herbicido... produktita de la sama firmao je prezo tro kosta por la sudaj savanoj [I].

**2/ Blinde**! Tuj post la elekto de la tekniko por fabriki la transgenajn organismojn, la plej rapida maniero ("bombardado" al celĉeloj de la "plibonigota" organismo per la novaj elektitaj genoj, el partiklo-bombardilo) estas ofte preferata al maniero pli preciza (enigo de novaj genoj per biologia vektoro, ekzemple per bakterio).
Rezultas el tio, ke la enigo de la novaj genoj en la celĉelojn okazas hazarde: kiam la enigo sukcesas [II], oni ne scias kie precize lokiĝas la novaj genoj en la kromosomojn, nek po kiom. Kaj oni ne scias, ĉu tio povas efiki sur la globan biologian funkciadon de la ĉelo kaj de la organismo...

**3/ Skuege**! Transgena organismo estas nova vivaĵo, kies enkondukon en agran, bredan aŭ akvan medion oni devas zorge priatenti: ĝian efikon sur la vivantan medion oni ne apriore konas. Necesas do zorgeme kaj longe observi tion, kio okazas antaŭ ol disvastigi kaj ĝeneraligi ĝin. Tiu malrapida prudenteco neakordigeblas kun la postulo de tuja financa rendimento de la firmaoj, kiuj produktas tiujn organismojn. Nu okazas, ke la nekontrolata dissemado de la novaj karakteroj ekde la transgenaj plantidoj al sovaĝaj plantoj estas klare timeginda, ĉu pro la naturaj interspeciaj krucadoj, ĉu tra la bakteria flaŭro de la grundo. En tiu kazo, ĉu oni bone imagas la konsekvencon de la dissemado de karaktero ekzemple pri rezisto al herbicido [III]? Aliflanke ĉu oni bone imagas, pli ĝenerale, la efikojn sur la biodiversecon de la enkonduko de organismo kiam ĝi prezentas fortajn konkurencajn avantaĝojn[IV].

**4/ Kaj pri nia sano**? Ni konfesu, ke la temo pri homa nutrado estigas la plej malpravajn fantasmojn, tiom malmulte probable estas, ke la karakteroj sur kiujn portas la transgenetiko estas ligitaj al homa tokso.
Sed la nutraj kutimoj staras inter la plej rigidaj kulturaj trajtoj [V], tial ekzistas notendaj psikologiaj rezistoj. Tamen la enkonduko de nekutimaj proteinoj en la vegetalaj aŭ animalaj nutrofontoj destinitaj al homo povas estigi, ĉe kelkaj personoj, alergiajn netolerojn malfacile antaŭvideblajn, ĉar temas pri tre individuaj reagoj,

---

I Sen konsideri, ke trakti dekmilionojn da hektaroj per totala herbicido ŝajnas ekologie stultega.

II Ĝi ne ĉiufoje sukcesas... el kio la neceso ligi al la "utila"geno alian genon, nomitan "markanta", kiu ebligas rapide konstati la sukcesintajn transmetojn. Kiam tiu markanta geno kodumas por antibiotiko kiu estos tiel dislanĉita en la naturon, oni vidas ekaperi novaj mediaj problemoj pri publika sano.

III Ekzemple, transgena kolzo rezista al la herbicido "glyphosate" povas transdoni tiun reziston al multaj sovaĝaj kruciferacoj.

IV Kelkaj transgenaj fiŝoj malaperigas pro ilia premo sur la nutraj fontoj multajn speciojn malpli viglajn ; transgena maizo rezista al pirala raŭpo estas toksa por aliaj neparazitaj lepidopteroj.

V Oni povas demandi nian amikon Christian Trianneau kiom multe li ŝatas manĝi fritita jn raŭpojn kiam li vojaĝas en Sahelo...



kies determinismo estas ege kompleksa. Temas pri ĝenerala medicino, malfacile priparolebla.

**5/ Ĉu nova formo de ligita laboro**? Same kiel pri hibridaj semoj el unua generacio (la "F1-hibridoj") agrikulturo ne povas destini parton de sia rikolto de transgenaj grajnoj al resemado de siaj kampoj dum posta sezono. Fakte, aŭ tiuj semoj fariĝas multe malpli produktivaj, aŭ ili estas tute ne fekundaj. Do necesas reaĉeti novajn ĉiujare, tre koste. Krome, la elekto valorigi tiun kostan prezon de la semoj estas ligita al tiu intensigi sian kultivon per grandaj alportoj de agrokultivaj necesaĵoj kaj de mekanikigo al altaj rendimentoj.. nu! Ofte la sama firmao produktas la transgenajn semojn kaj necesaĵojn: oni vidas iom post iom skiziĝi modelo de fakprofesiaroj sinen de kiuj agrokultivisto estos lokita per kontrakto kun firmao, kiu provizos ĝin per semoj kaj necesaĵoj, trudos al li produktan planon pri la kultivaj zorgoj kaj aĉetos lian produkton por ties agronutra transformado. Fariĝinte liveranto de servoj, la agrokultivisto estos perdinta sian memregadon pri decido kaj faro same kiel sian rolon de reganto de la kampara areo: el tiu vidpunkto, jen programita morto de la tradicia agrikulturo, kiu vivtenigas ankoraŭ la plej grandan parton de la monda loĝantaro kaj kiu tenas la agroekologiajn spacojn ankoraŭ traviveblaj.

**6/ Ankoraŭ pli malbone en sudo**! Pli malbone ĉar ne nur la Esplorado en la riĉaj regionoj disdegnas la transgenajn solvojn, kiuj povus plibonigi la vivtenajn produktojn de sudo, ne nur la transgenaj teknikoj estas finance nealireblaj de la sudaj landoj, krom per plukreskigo de sia neeltenebla ŝuldiĝo, sed ankoraŭ ĉar kurantaj bioteknologiaj esploradoj celas tute simple la kreadon en nordo de produktoj anstataŭigaj de la sudaj, kiel kakao, kafo, kotono, sukero aŭ vanilo. Pli malbone ankaŭ ĉar la trudata komercliberigo jam atingas superŝuton de la sudaj merkatoj per varoj, transgenaj aŭ ne, kiuj malmultekoste konkurencigas la lokajn produktojn.

Do jen rapide skizita la posta medalflanko "transgenetiko". La antaŭa flanko estis **kona scienco**, la posta flanko estas **produktiva teknologio**. Inter ambaŭ, la dikeco ne tre certas. "Scienco sen Konscienco nur ruinigas animon" diris Francisko Rabelezo[VI], kiun de nun oni povas parafrazi jene: " Teknologio sen etiko ruinigos la homaron".

La fundamentaj donitaĵoj de tiu grava situacio estas unuflanke la kontrolo fakte suverena de la transnaciaj societoj pri esplorado kaj investado[VII], aliflanke la mirinda praktiko de la patentado de vivaĵo. Tio ĉar en la nuna ekonomia sistemo ĉiu bioteknologia invento patentiĝu por komerca garantio. Kaj kvankam tiu invento koncernas nur la regadon de iu gena informo, fakte la fizika portanto de la informo, do la geno, fariĝas por longa tempo propraĵo de la inventinto.
Nu tiel konsistiĝas nekredebla friponaĵo, ĉar ĉiuj genaj ekipoj de ĉiuj estuloj antaŭekzistis ol homa teknologio! Neniam iu **fabrikis** genon. En transgenetiko, la teknologio nur plurobligas kaj translokigas ĝin: la invento estas nur **procedo**. Kvazaŭ iu ino, kiu instruus al siaj amikinoj novan teknikon de preparado de maniokaĵo, devigus ilin pagi al ŝi, krom ŝia instruado, la tutan maniokaĵaron, kiun ili fabrikos dum dudek jaroj trudante ilin ne fabriki ĝin alimaniere!

Friponaĵo des pli grava, ke ĝi metas la longtempajn bezonojn de la homaro inter la manojn

VI François Rabelais, franca verkisto de la 16a jarcento.

VII Nun neniu publika laboratorio havas rimedojn por daŭrigi sendependan esploradon pri transgenetiko: ĉiuj laboras kontrakte kun unu aŭ pluraj privataj firmaoj, kiuj ĉar ili alportas monon, kompreneble premas sur la esploran celigon kaj la diskonigon de la rezultatoj.

de kelkaj firmaoj, kies privataj interesoj estas planeblaj nur kurtperiode. Nur senpripensulo povas imagi, ke la ĝeneralaj bezonoj povos estis kontentigataj laŭ la apartaj interesoj de teknologia oligarkio, kiu arogas al si kvazaŭ monopolan situacion.

Klare, pri transgenetiko same kiel pri aliaj globaj teknologioj, la mondo surkape marŝas. La afero ne temas pri la transgenetika scienca principo, sed pri la kondiĉoj de ĝia teknologia kaj komerca efektivigo. La demando "ĉu por aŭ ĉu kontraŭ la GMO" ne estas ĝusta. Indas nek konfuzi maniokaĵon kaj la kaserolon, en kiu ĝi kuiriĝas, nek " ĵeti la bebon kun la banakvo". La ĝusta demando estu: **"Kia transgenetiko, por kiu, kiamaniere?"**

Ni respondas, ke de nun ne plu estas ebla globa teknologia progreso **sen ĝenerala civitana planedskala mastrado** de ĉiuj stadioj de la procezoj de esplorado, decido, efektivigo. Travidebleco kaj kontrolo de la celoj, de la metodoj kaj de la esplorrimedoj. Travidebleco kaj kontrolo de la celoj, de la metodoj kaj de la rimedoj de teknologia disvolviĝo.


Vasta programo, kiu postulas antaŭaĵon: mondskale organizi la civitanecon tiamaniere ke la homaro fariĝu kapabla taski al si tiun mastradon de sia propra destino. Tio ne plu estas utopia, kiel atestas la stariĝo de la monda civitana movado tra la mondaj socialaj forumoj. Ja tio ankoraŭ prokrastiĝos. Tial, atendante, tri damaĝevitaj decidoj eblas al la aktivaj soci-ekologiaj movadoj:

1/ Deklari nepropriĝebla la mondan genetikan riĉofonton, kiel komunan havaĵon ne nur de homaro, sed de ĉiuj estuloj. Tre rapide reformi la leĝarojn pri patentoj en tiu perspektivo, kun frostigo de la kurantaj patentoj.

2/ Submeti ĉiun socian decidon pri transgenetiko sub duopan kontrolon: parlamenta kontrolo en la demokrataj landoj, kie la civilsociaj kontraŭpovoj agadas, kaj kontrolo de biosekureca agentejo kreota sine de UN.

3/ Garantii teknikan kaj ekonomian alireblon al la transgenetikaj organismoj utilaj al la plej malriĉaj loĝantaroj konsiderante la apartajn bezonojn de la kamparanaj agrikulturoj, de la agropaŝtistaj socioj, de la metia fiŝkaptado.

Alain Cavelier, agronoma inĝeniero
Represita kun permesoj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato kaj Alain Cavelier, el <http://www.globidar.org/solidareco/mseo78.htm>



# Starpunktoj kaj kroniko de Ekologiisma Frakcio/Verduloj



Dum sia longa historio kaj kun sia geografia diverseco, Eŭropo evoluigis tre riĉan kaj varian manĝaĵokulturon, de tomatoj al fromaĝoj, vinoj kaj regionaj pladoj. Tamen, ĉi tiu diverseco estas minacata de la industria modelo de manĝaĵoproduktado flanke de la komunumaj agrokultivadaj kaj fiŝkaptadaj politikoj. Kiam EU estis fondata en la 1950aj jaroj, la emfazo estis sur rapide pliigata produktado, uzado de kemiaj sterkaĵoj kaj insekticidoj. Ĉi tio estas reflektita en la Traktato de Romo kaj restas senŝanĝa en la Traktato de Lisbono. Dum akceli produktadon per ajna rimedo estis komprenebla post la dua mondmilito, kiam ankoraŭ mankis manĝaĵo, Verduloj kredas, ke tio hodiaŭ ne plu estas konvena politiko por EU.

La kvazaŭ magia formulo de "ĉiam pli granda produktado" dume ignorante la sekvojn rezultigis kontaminadon de la grundo pro troa uzo de kemiaĵoj kaj reduktado de fiŝstokoj pro troa fiŝkaptado. Bienoj fariĝis ĉiam pli grandaj kaj pli industriaj, je la malutilo de malgrandaj, familiaj bienoj. Tiu tendenco estis instigita de grandegaj agrikulturo-subvencioj, kiuj celas intensan besto- mastrumadon kaj kultivadon, kun la plejparto de financoj irante al grandaj bienoj. La serĉo pri pli altaj produktadoj kaj malaltigado de la kostoj estigis la eliminon de tradiciaj variaĵoj kun variaj formoj aŭ grandecoj. Jaroj da subvenciado por la fiŝkaptada industrio estigis ŝiparojn, kiuj estas multe tro grandaj kompare kun la haveblaj fiŝstokoj, kaj ŝipojn kiuj kaŭzas gravan damaĝon al la mara medio.

EU kaj kelkaj aliaj industriigitaj landoj pere de Monda Banko kaj Internacia Monfonduso (IMF) devigis evolulandojn redukti siajn importtarifojn (doganajn) kaj malfermi siajn merkatojn al subvenciitaj EUaj produktoj, kiuj estas pli malmultekostaj ol manĝaĵo produktita loke, sekve malhelpante ke ili subtenu sian propran agrokultivadon kaj lokan nutraĵan sekurecon. La rezulto estas grandega difektado de kamparaj ekonomioj en evolulandoj.
Sed multaj eŭropanoj malakceptas ĉi tiun modelon. Ekzistas obstina rezisto kontraŭ hormonotraktita bovaĵo kaj GMOj. La movado Malrapida-Manĝaĵo kaj la organika komunumo specife celebras la kvaliton kaj varion de eŭropa manĝaĵo kaj kuirado. Fiŝkaptado kaj agrokultivado estas malsamaj aktivaĵoj - unu okupiĝas pri la ekspluato de sovaĝaj, renovigeblaj specioj dum la alia estas bazita sur kultivado de hejmigitaj kreskaĵoj kaj bestoj. Tamen ambaŭ estas objektoj de limoj al tio, kio povas esti produktita sen difekti la ekologiajn sistemojn, de kiuj ili dependas. Verda manĝaĵopolitiko respektas tiujn limojn kaj funkcias ene de ili por produkti sanan, lokan kaj diversan manĝaĵon.

### Kernaj faktoj kaj nombroj

Organika agraro okupis pli ol 4% de agrikultura agraro en 2006 (6.8 milionoj da hektaroj) kaj estas pliiĝanta. Ĉi tio estas nemalhavebla rimedo kontraŭ la uzo de kemiaĵoj en agrikulturo kaj la ĝenerala perdo de biologia diverseco.
El la 7.000 varioj de pomoj kreskantaj kaj konsumitaj en Eŭropo je la komenco de la lasta jarcento, nur 15% postrestas. La UN-a Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo taksas, ke 75% de la biologia diverseco troviĝinta en agrokultivado en la pasinta jarcento estis perdita dum la pasintaj 50 jaroj, de kiam manĝaĵa produktado iĝis ĉiam pli industria.

EU jam spertis kelkajn san-krizojn en agrokultivado (BSE, dioksino, birda gripo) rezulte de la industria modelo en tiu sektoro. Tiaj krizoj multobliĝos, se Eŭropo obstine plu iras en sia aktuala direkto. La kampara

medio, inter kiuj estas akvo, grunda fekundeco kaj biologia diverseco, ankoraŭ plu degeneriĝos pro agrikulturaj praktikoj, kiuj estas tro intensaj kaj energivoremaj. Politikoj, kiuj preferas ĉiam pli grandajn bienojn, reduktos kamparan dungadon kaj instigos la fuĝon de la kampara regiono al la urboj. Perdo de ankoraŭ pli tradiciaj varioj de kultivaĵoj kaj bestoj reduktos nian kapablon adaptiĝi al ŝanĝantaj ekologiaj kondiĉoj, ekz-e klimatŝanĝiĝo. Malsukceso en strebo, batalo, peno por fundamente reformi la "Komunan Politikon pri Fiŝkaptado" tiel, ke ĝi sekvu antaŭzorgan pritrakton de fiŝkaptada administrado rezultigos daŭran malpliigon de fiŝstokoj kaj daŭre pliigantajn importaĵojn de fiŝo en EU-on.

Tio havos gravajn sekvojn en Eŭropo kaj tutmonde, kaj por la mara medio kaj por fiŝkaptadaj komunumoj, kiuj dependas de abunda fiŝstoko por sia vivteno kaj nutraĵa sekureco.

## Verdulaj atingoj 2004-2009

**Pesticidoj**

Verduloj gajnis historie decidan batalon - protekto de la publika sano estas la emfazo de la nova reguligo pri pesticidoj. Principe, novaj substancoj, kiuj estas kancerogenaj, genŝanĝaj, venenaj al reproduktado aŭ endokrine difektemaj, aŭ substancoj, kiuj estas persistaj, biologie akumuliĝantaj kaj toksaj, ne plu rajtas esti surmerkatigataj kaj la nun ekzistantaj estos malpermesataj, kiam iliaj aktualaj rajtigoj eksvalidiĝos. Specife atentataj estos kemiaĵoj, kiuj malfavore trafas abelojn, kio rapide malaperas en Eŭropo sed estas gravegaj por agrokultivado kaj naturprotektado.

**GMO-oj**

La Verduloj ĉiam batalis kontraŭ la importado kaj kultivado de GMOj kaj ni akiris regulojn por protekti la medion kaj homan kaj bestan sanon, kaj sekurigi travideblecon. Verduloj dominas tiun aferon en la parlamento kaj certigas, ke organika kultivado ekskludas GMOjn. Ekde 2004 manĝaĵ- kaj nutraĵproduktistoj devas etikedi siajn produktojn, se ili inkluzivas materialon/elementojn el genetike transformitaj plantoj. Tiu etikedo ofertas al kultivistoj kaj konsumantoj la rajton diri "ne" al genetike transformitaj plantoj.

**Konservado de genetika diverseco**

Verduloj sukcesis establi leĝaron kaj programojn favorajn al la konservado de genetika diverseco en agrokultivado. Ni akiris reguligon provizantan financan subtenon al neregistaraj organizoj, bredistoj, kultivistoj kaj universitatoj, kiuj okupiĝas pri konservado kaj antaŭenigado de la uzo de loka kaj tradicia semaj varioj kaj brutoj; kaj ni ankaŭ akiris novan EUan semoleĝon, kiu permesas specifan merkatumadon de tiuj varioj en EU.

**Malleĝa fiŝkaptado**

La Verduloj montris la EUan malsukceson batali kontraŭ malleĝa fiŝkaptado kaj en eŭropaj akvoregionoj kaj tutmonde. Ni devigis la Komisionon proponi reguligon por malleĝe kaptitajn fiŝojn el la eŭropa merkato, estigi "nigran liston" de ŝipoj, kiuj funkcias malleĝe kaj trudi severajn punojn. Ni sendis la proponon al la parlamento kaj sukcese kontraŭbatalis penojn valorigi ĝin nur por neeŭropaj ŝipoj.

## Kion Verduloj volas

**Neniu GMO**

Verduloj deziras agrokultivadon sen GMO kaj volas, ke regionoj kaj landoj havu la rajton malpermesi GMOjn. Necesas striktaj reguloj por malhelpi malpurigadon. Aktuale etikedoj por bestoproduktoj, kiel ovoj, lakto kaj viando, ne indikas, ĉu la bestoj estis nutritaj per genetike modifitaj plantoj. La Verduloj insistas, ke konsumantoj rajtas scii, ankaŭ kiam ili estas konsumantaj GMajn produktojn nerekte, tial ni ankoraŭ batalas por reguligo de la etikedado de produktoj el bestoj, kiuj estas nutritaj per GMOj.

***(komplete trovebla en Esperanto sur www.verduloj.org )***

SAT



*trad:Jordi Alcàsser*

# Transgenaj terpomoj por produkti paperon kaj gluaĵon

***Agantaj Ekologiistoj / Ecologistas en Acción***

Ĉu tio estas la tiom priparolata solvo kontraŭ la malsato, kiun promesis la genetika inĝenierarto?

La Eŭropa Komisiono permesis la duan transgenan kultivaĵon en Eŭropo: transgenan terpomon, kiu estas propraĵo de la ĥemia giganto BASF kaj kies amelo estas modifita por faciligi ĝian uzadon aŭ la fabrikado de papero, lavpulvoroj, gluaĵo kaj pliaj industriaj produktaĵoj [I]

La permesigo de tiu ĉi kultivaĵo estis "ensabliĝanta" ĉe Bruselo ekde la 2005a, sed la nova Eŭropa Komisiono uzis la privilegion, kiu permesas al ĝi decidi, kiam ne estas konsento en la Konsilio, preterlasante la kontraŭstaron de la plejmulto el la ministroj de la membrolandoj kaj de iliaj zorgoj pri la sanaj kaj mediaj riskoj de tiu ĉi terpomo.

La permesigo de la BASFa terpomo estas altgrade polemika, inter aliaj kialoj, ĉar ĝi enhavas genon, rezistantan antibiotikon, kiu estas uzata kontraŭ iuj infektaj malsanoj kiel la ftizo. La eŭropa leĝaro pri liberigo de genetike manipulitaj organismoj (GMO) postulas la malaperigon de tiuj ĉi variaĵoj, kaŭze de la danĝero, kiun supozas la disvastigo de la rezisto kontraŭ antibiotikoj al malsanigaj bakterioj kaj ĉar nun estas teĥnologioj, ebligantaj forigi la genon de la rezisto [II]. Fakte tiu ĉi estis la kialo pro la flankenigo je la 2005a de la transgena maizo, kiun oni kultivis en Hispanio ekde la 1994a, tiaj danĝeroj estis ree kaj ree denuncitaj de la ekologiistaj organizoj. Tamen la Eŭropa Agentejo pri Nutraĵa Sekureco (EANS / EFSA) submetiĝis plian fojon al la industriaj interesoj kaj malkonfesis siajn antaŭajn informojn kaj avaligis la sekurecon de la BASFa terpomo per informo en junio de 2009, per kiu ĝi asertas, ke la disvastigeblo de la rezisto kontraŭ antibiotikoj al la bakterioj estas apenaŭ ebla kaj ke tio estis demonstrita nur ĉe laboratorio (ne ĉe la naturo). Apenaŭ ebla tamen ebla. Kie restas la principo pri antaŭgardo?

Aliflanke la permesigo de kultivo genetike modifita kun industria celo malfermas la pordon al nova generacio el transgenaj plantoj ege zorgotirantaj: la variaĵoj planitaj por produkti amelon, plaston kaj ĉiutipajn industricelajn ĥemiaĵojn kaj tiuj nomitaj "farmacikultivoj", kiuj produktos kuracilojn por la farmacia industrio. La polucieblo de la nutraĵa ĉeno fare de tiuj ĉi produktaĵoj kaŭzis en Usono gravan rifuzon kontraŭ la unuaj permesigoj al ĉi-tipaj kultivaĵoj. Okaze de la BASFa terpomo oni antaŭvidis, ke ĝiaj restaĵoj estu uzataj por besta nutrado —kaj la poluado de la tuta nutraĵa ĉeno, kun la sekvaj sanriskoj, estas praktike neevitebla.

La manipulado de la nutraĵaj kultivoj por modifi ties konsistigon, adaptante ĝin al la industriaj bezonoj, klare demonstras la mensogon de la promesoj de la bioteĥnologia industrio, kiu prezentas tiun ĉi teĥnologion kiel la solvon kontraŭ la malsato en la mondo. La tutmonde komercigitaj transgenaj kultivaĵoj estas projektitaj ne por nutri la mondon sed ĉefe por profiti la agroĥemian industrion, kiel demonstras la fakto, ke pli ol 80% estas variaĵoj rezistantaj la herbicidojn. Oni taksas, ke en nur Usono ĉi-tipaj kultivaĵoj

---

I BIOSAFENET. Germana Ministrejo pri Instruado kaj Scienco. GM starch potatoes as a renewable raw material. Amflora a potato for industrial applications. <www.gmosafety.eu/features/>

II BIOSAFENET. Germana Ministrejo pri Instruado kaj Scienco. Antibioticresistance genes as markers. Once necessary, now undesirable. <www.gmosafety.eu/features/>

**Nia dosiero - Genetike Modifitaj Organismoj**

kreskigis la herbiciduzon je 173,5 milionoj da kilogramoj dum la lastaj 13 jaroj kaj okazigis la aperon de herbaĉoj, rezistantaj la herbicidojn, kiuj minacas fariĝi koŝmaro por la kamparanoj —kaj kiuj generas grandan negocon por la grandaj transnaciaj agroĥemiaj entreprenoj [III].

La BASFa terpomo estas plia pruvo pri kiaj estas la ĉefceloj de la transgena industrio kaj pri la nutraĵa kaj agrokultura modelo, kiun ĝi klopodas trudi. Nur unu el ĉiuj kvar terpomoj produktitaj en Eŭropo celas la homan nutradon. Ĉirkaŭ duono el ili finas kiel bestonutraĵo kaj la restanta kvarono estas uzata kiel krudmaterialo por produkti amelon, alkoholon kaj pliajn industriajn produktojn [IV]. En Germanio —tradicie granda konsumanto de terpomoj— duonon de la nuna rikolto oni destinas al industrio (produktado de amelo, alkoholo, bestonutraĵoj...), dume ĉe la homa konsumado elstaras la uzado de terpomoj en nutraĵoj procezigitaj, pakitaj kaj transportitaj granddistance. Oni kalkulas, ke el iamaj jaraveraĝe 285 kilogramoj da terpomoj la germana konsumanto ingestas nun ĉ. 70 kilogramojn, 50% el kiuj estas prilaboritaj produktoj —multe pli profitodonaj por la agroindustrio [V]. Ĉi-tipa konsumado estas ligita al agrokultura kaj nutraĵa modelo, malŝparanta energion kaj resursojn kaj dependa de importadoj (bestonutraĵoj, palmoleo ktp) de la Tria Mondo, kio minacas la nutraĵan suverenecon de tiuj ĉi landoj kaj lastinstance la estonton de la tutmonda nutrado.


---


III Benbrook, Charles (2009). Impacts of Genetically Engineered Crops on Pesticide use in the United States: the First Thirteen Years. The Organic Center. Critical Issue Report. Nov. 2009.

IV GMO Compass. GM Potatoes. Starch as a renewable source. http://www.gmo-compass.org/eng/grocery shopping/crops/23. genetically modified potato.html

Ecologistas en Acción: «Patatas transgénicas para producir papel y pegamento». http://www.ecologistasenaccion.org/spip.php?article16852

V BIOSAFENET. Germana Ministrejo pri Instruado kaj Scienco. Crisps, chips and starch: The demise of the traditional table potato. <www.gmosafety.eu/features/




Fonto: BIOSAFENET. Germana Ministrejo pri Instruado kaj Scienco

*Markus Sunela*

# Baza principo

Estas tre kutima afero uzi antibiotikrezistajn genojn en transgenaj organismoj. Kiam oni volas modifi la DNA-on, oni konstruas t.n. vektoron, kiu havas la genojn kiujn oni volas doni al la organismo. Tiu vektoro ankaŭ difinas la lokon en DNA kien novaj genoj lokiĝos sed ankaŭ tre ofte iun econ per kio oni povos kontroli kiuj ĉeloj havos la novan genon. Kiam oni "instalas" la vektoron en ĉelo, tio sukcesas eble nur malpli ol 1 % de provoj. Pro tio oni devas havi iun rapidan manieron kontroli ĉu la instalado sukcesis: kutime tio estas antibiotikrezisteco aŭ eco kiu ebligas la ĉelon produkti ekzemple koloran substancon. Uzante antibiotikrezistecon la sukcesaj ĉeloj estas tiuj, kiuj ne mortas pro la antibiotiko. Antibiotikrezisteco neniam povas esti ĝenerala: ĝi ĉiam estas efektiva nur kontraŭ unu aŭ kelkaj antibiotikoj. La instalado plej ofte okazas uzante bakterifagon (viruson kiu infektas bakteriojn). Virusoj ja nature instalas sian DNA-on en la infektitan organismon, kaj estas tre facile anstataŭigi la DNA-on de viruso per planita geno.

Nu tiel oni faras kun bakterioj (prokariotoj), kiuj ja estas mia fako. Sed kun eŭkariotoj, kiel insektoj, bestoj, plantoj kaj homoj oni ja devas fari ankaŭ aliajn artifikojn. Ilia DNA estas pli bone protektita ktp. Sed en principo la metodo estas pli malpli sama.

Pri disvastigo de genoj: nur al (kelkaj) prokariotoj (bakterioj) eblas interŝanĝi genojn kun aliaj organismoj. Kelkaj el la genoj en bakterioj estas en plasmidoj, kiuj estas malgrandaj rondaj pecoj de aldonaj genoj. Ili tre multe similas al DNA, sed ili estas tute apartaj de kaj aldonaj al DNA. Plasmidoj kutime enhavas ekzemple genojn por antibiotikrezisteco kaj aliajn genojn kiuj ne estas tiom gravaj por la baza funkciado de la ĉelo, sed ja povas esti utilaj por la bakterio. Tiujn plasmidojn bakterioj povas transdoni aŭ interŝanĝi kun aliaj bakterioj. Tia transdonado/interŝanĝado nomiĝas horizontala. Normalan DNA-on bakterioj ne povas interŝanĝi.

Por pli altaj organismoj, eŭkariotoj kiel plantoj, bestoj ktp. tia interŝanĝado tute ne eblas. Sed kio do eblas? Fakte, eŭkariotoj povas interŝanĝi genojn nur per seksa reproduktado. Tiam la ido ricevas parton de la genoj de patro kaj parton de patrino. Ankaŭ alia metodo ebletas, sed estas sufiĉe malprobabla: se iu viruso infektas organismon, la virusoj, kiujn produktas la infektita organismo, povas havi ankaŭ partojn de la DNA de la "gastiganta" organismo, aldone al tiu de la viruso mem. Sed pro tio ke virusoj infektas nur unu specion aŭ eble ankaŭ tre similajn speciojn, ambaŭ metodoj de disvastigo de la genoj eblas nur inter la sama aŭ tre similaj specioj.

Tiel do oni ne devus timi ke la genoj disvastiĝus aŭ ke iel la antibiotikrezisteco de la terpomo povus iel eniri bakteriojn. La plej malbona afero kiu povus okazi estus ke ankaŭ aliaj terpomspecioj povus ricevi tiun genon. Sed tio ja tute ne gravas.

Alia afero estas tio, ke homoj tute ne povas (pli malpli) mem krei kaj inventi genojn. Oni nur povas rekoni certajn genojn en iuj specioj kaj kloni tiujn genojn en iun alian organismon. Tio signifas, ke ĉiuj ecoj, kiujn oni povas aldoni al organismoj uzante genteĥnologion, ekzistas jam antaŭe en naturo. Ekzemple tiun antibioktirezistecon ja jam havas kelkaj bakterioj, kiuj tute nature ekzistas en naturo. Estas multege pli probable ke tiuj bakterioj donos tiun genon al aliaj bakterioj ol tio ke bakterioj ricevus la genon de la terpomo (fakte tio tute ne eblas sen uzo de genteĥnologio).

SAT

*Alejandro Cossavella*

# Plibonigoj

Komence, ni petas dentojn metalajn, pulmojn fumimunajn, hepatojn kapablajn elteni hektolitrojn da viskio aŭ erektiĝojn laŭvolajn. Poste alvenas la vico de senmorteco, amo senlima, eterna paco aŭ io tia.

Kial ni kadukiĝas? Kial niaj korpoj kaj vivoj ne estas tiaj, kiajn ni kapablas ilin sopiri? Niaj imagpovo kaj postulemo estas multe pli grandaj ol nia kono pri ĉi stranga fenomeno nomata vivo. Sed nia manko de kompreno -aŭ akcepto- de nia situacio tute ne limigas niajn aspirojn. Tiom evoluemaj ni fariĝis, ke jam nenio sufiĉas por kontentigi niajn ĉiam novajn bezonojn.

Eĉ malgrandaj infanoj akceptis tion, ke feliĉo troviĝas ie en la estonteco. Sen tiu biciklo, ne eblas rideti. Ni mem povas pensi tion, kie ni trovos la energion necesan por kanti dum duŝado, se niaj okuloj estas brunaj kaj malfortaj?

Nu, la afero estas ke verŝajne nenio jam sufiĉe bonas tia, kia ĝi estas. Terkulturistoj opinias ke la tradiciaj tomatoj ne kapablas kreski en kvantoj por ili riĉigaj kaj kontentigaj, do, ili alvokas sciencistojn por ke ili genetike modifu tiujn ruĝajn ribelulojn kaj adaptu ilin al realaj cirkonstancoj.

La ekzemploj de ĉi antaŭe menciita sinteno estas multaj. Kio ne oftas, estas la demando: Kiamaniere povus mi adaptiĝi plej feliĉige al ĉi mondo? Kompreneble, multaj opinios ke ni ne estas bestoj serĉantaj nenion krom pluekzistado. Ke ni havas idealojn, aspirojn, dezirojn. Prave ili asertos ke nia racio devigas nin trovi la plej adekvatajn rimedojn por kiel eble plej bone vivi sur la planedo. Ke kontenti estas ne inda de niaj kapabloj.

Teorie, mi konsentas, sed en la praktiko –tiu aĉa montrofenestro de niaj malfortoj-ne. Nome pro la civilizacio kaj pro la progreso, milionoj da homoj spertas ĉiutage la mizeran flankon de la ekzistado. Tio ne parolas tre bone pri ni kiel supera specio.

Revenante al la temo de la plibonigoj, iom ŝokas mian racion (ha ha ha) la fakto, ke la plej multo el la dezirataj plibonigoj celas kutime eksteraĵojn. Eĉ se kelkaj meditas, preĝas aŭ klopodas evoluigi ankaŭ la “homajn kapablojn”, la tempo dediĉita de la plimultoj al sopirado pri novaj elektronikaĵoj kaj aliaj plezurigaĵoj estas multe pli granda kaj evidenta.

Same kiel ni emas forĵeti malnovajn vestojn, ni ŝatus forĵeti nian maljuniĝantan korpon. Sed tio ne estas simptomo de vekiĝo de nia spirita konscienco: nur plia pruvo pri nia senbrida postulemo senresponsa.

Ĉu ni ne povus mem fari kelkajn plibonigojn mensajn kaj emociajn, sendepende de tiuj, kiujn ni petas de la sistemo?

Bedaŭrinde, la sistemo ankoraŭ funkcias glate kaj novaj partoprenantoj estas trejnitaj ĉiutage en centroj endoktrinigaj (lernejoj). Mekanikaj instruistoj transdonas la sciojn necesajn por pluvivigi la monstron, por ĝin nutri kaj flegi tiel, kiel ĝi bezonas.

Ĉu ekzistas eliro el ĉi spirala labirinto detruiga en kiu la homaro verŝajne troviĝas? Ĉu ni, kiel individuoj aŭ socie, povus per rimedoj ne celantaj modifi la fizikan mondon, sed la mensan, plibonigi

nian vivmedion?
Evidentiĝas ke la emo al magiaj solvoj estas multe pli popularaj ol tiu al respondeco. Se anstataŭ doni al mia korpo la nutraĵojn kiujn ĝi bezonas, mi plendas kaj postulas ŝanĝojn, plej verŝajne mi frustriĝos. Se anstataŭ agi mi atendas ke aliaj agu, eble la bono kiun mi imagas neniam realiĝos.
Nun mi devas forlasi la verkadon de ĉi transnacia artikolo antaŭ ol ĝi fariĝos tro longa, teda kaj sensenca.

Krome, mi devas viziti la dentiston. Damne, kial ni ne havas dentojn metalajn? Finfine, la mondo estas mistera kaj ni eĉ ne scias kial –se tiu kialo ekzistas- ni estas ĉi tie, spirante fumojn toksajn.

Dentoj metalaj. Mi komencas ŝati tiun ideon…

Eble ĉio estas en ordo, laŭ ies vidpunkto.

SAT

*Manfred Westermayer*

# Genetike Modifitaj Organismoj

## Kio estas genetiko

Ĉiuj organismoj, plantoj kaj bestoj - muskoj, musoj kaj muŝoj, ŝarkoj, paseroj, helikoj kaj la homo - sur nia planedo Tero biologie funkcias laŭ la sama baza principo. Vivi kaj heredi la genojn. La monaĥo Gregor Mendel trovis en 1866 la heredajn regulojn kaj en 1953 James Watson kaj Francis Crick malkovris la duoble helikan strukturon de la DNA: du fadenoj formitaj de nukleotidoj konsistantaj el fosforata acido, desoksiribozo (suker-simila molekulo) kaj el unu el kvar nukleaj bazoj (A,G,C,T).
La hereda mekanismo funkcias je ĉiuj genroj kaj specioj de nia planedo surbaze de DNA (desoksi-ribonukleataj acidoj), kies bazaj molekuloj troviĝas en 4 diversaj formoj: 2 purinaj acidoj A kaj G (adenino kaj guanino) kaj 2 pirimidinaj C kaj T (citozino kaj timino).
La du fadenoj tenas sin kvazaŭ zip-e, tiel ke ĉiu bazo de unu faden-ero pariĝas kun la komplementa - A+T kaj G+C - de la dua fadeno, kaj estiĝas heliko-forma duobla fadeno - la kromosomo. Tiel estiĝas kvazaŭ eskalo kun flankoj el fosfato kaj sukero kiuj estas transe ligitaj per la bazoparoj AT aŭ GC; krome ĝi estas distordita. Tiu longega, sed molekulskala tordita eskalo konsistas el milionoj da eskaleroj kaj nomiĝas kromosomo (ĥromosomo).
La lingvo de la genetiko konsistas el tiuj 4 nukleotid-bazoj, la literoj, kiuj pariĝas. Ĉiu vorto konsistas el 3 paroj; el tio sekvas $4^3=4*4*4=64$ diversaj vortoj, nomataj kodonoj. Ĉiu kodono enhavas specifan informon: Ĉu por produkti unu el la 20 diversaj aminoacidoj, ĉu utili kiel“gramatika informilo” por ebligi la ĝustan legadon de la genoj: ekz-e AUG signalas la komencon de proteino, UAA aŭ UAG la finon de proteino. Ĉiu geno estas frazo el tiaj kodonoj; kaj unu ĉeno da genoj nomiĝas kromosomo.
Simpla organismo, la gisto, havas 16 kromosomojn kun entute pli ol 6.000 genoj. La genetika heredo de ĉiu specio aspektas biblioteko, kaj ĉiu viro kaj ĉiu virino havas la samgrandan genetikan bibliotekon, sed ĉies biblioteko diferencas iomete de la aliaj, krom je unu-ovaj ĝemeloj; esceptoj estas homoj kun genetika mutacio, kiel Trisomio 21.

La specio homo karakteriziĝas per 46 kromosomoj, hom-simio 48 - la genetika diferenco inter homo kaj hom-simio estas malpli ol 3%-oj. Dum la homo havas 3 miliardojn da bazoparoj, la muŝo drosofilo havas 160 milionojn, kiuj konsistigas 13.600 genojn. Thomas Hunt Morgan komence de la 20a jc. uzis ĝin por studi la genetikon, ĉar ĝi estas facile kultivebla kaj rapide reproduktiĝas. Drosofilo havas nur 4 parojn

da kromosomoj, el kiuj unu difinas la sekson - laŭ ĝies formo nomita X aŭ Y, same kiel ĉe la homo. Je la reproduktiĝo, ekz-e kiam ĉeloj plimultiĝas, la duobla-helika fadeno estas splitata, kaj kopiata.
Kiel funkcias la seksa reproduktado, tion studis Christiane Nuesslein-Volhard fine de la 20a jc. ankaŭ je drosofilo.

**Kiel produktiĝas proteinoj:**
Inter la geno-frazoj troviĝas t.n. promotoroj* kiuj difinas la komencon de la legenda frazo por konstrui proteinon. Tiu promotoro estas aktivata de hormono, kaj la kopiada procedo komenciĝas. Tiuj promotoroj estas specifaj de la specioj. Pro tio genetika informo ekz-e de bakterio ne simple povas funkcii en besto. Do, la duobla heliko estas splitata komence




**Por kio utilas la genetika informo:**
La organismoj uzas la informon kiu kuŝas en la aranĝo de la kodonoj por produkti la proteinojn kaj ankaŭ hormonojn ktp. Proteinoj ĝenerale konsistas el 20 diversaj aminoacidoj. Tio signifas, ke restas el la 64 diversaj kodonoj 44 por alia celo, ekz-e kiel gramatikaj unuoj por ebligi la legadon.
Proteino estas longa ĉeno da aminoacidoj, same kiel cent-perla dekora ĉeno el 20 diversaj perloj. Tiu tre granda molekulo ricevas sian strukturon el la konsisto kaj sinsekvo de la aminoacidoj: fadeneca, kugleca, faldita ktp.; kaj tiu strukturo rilatas al la funkcio de la proteino, ĉu por muskoloj, haŭto, haroj, sensoj.

de tiu promotoro. La enzimo polimerazo legas la sinsekvon de la nukleotid-bazoj kaj produktas la kopion de tiu "frazo" - kiu estas nomumita mesaĝila-RNA*. Tiu mRNA estas transportata el la ĉel-kerno en unu el la ribosomojn, kiuj troviĝas ekstere je la kerno, ĉirkaŭita de la citoplasmo*. Kaj tie laŭ ĉiu bazo-triopo (kodono) de la mRNA estas kopiata la ĉeneroj de transmeta-RNA (tRNA), kiu finfine funkcias kiel matrico por produkti la proteinon.

**Viruso, la plej simpla organismo:**
La esploristoj lernis de la virusoj kiel transiri la limon inter la specioj. Virusoj estas la plej simplaj organismoj, kiu enfiltriĝas en la ĉelon de bakterio aŭ alia organismo. Tiam la atakita ĉelo re-produktas la DNA-on de la viruso. Kiam oni trovis bakteriojn, kiuj povas tranĉi la virusan DNA-on, oni eltrovis la restriktan enzimon* por tranĉi DNA-on, kaj per la enzimo Ligazo oni povas kombini - t.s. molekule glui - la adician genetikan informon en tiun de la ĉelo.

**Plasmido, la gen-transportilo:**
Por enkonduki aldonan informon en plantan ĉelon oni uzas t.n. plasmidon, malkovrita en 1973 de Cohen kaj Bayer. Ĝi estas ringforma relative malgranda DNA-simila molekulo, trovebla en bakterioj, kiuj uzas ĝin por infekti plantojn. Ĝi enhavas adician informon en unu aŭ malmultaj genoj, produkti proteinon por ekz-e detrui venenon aŭ metaboli novtipan nutraĵon. Ĝi estas pli facile manipulebla ol kromosomo, ĉar ĉi tiu ringo estas malfermebla per enzimo je nur unu loko, kaj tiel ebligas la konstruon de gen-transportilo (t.n. vektoro).
Kutime oni uzas ti-plasmidon - laŭ tiu kiun oni trovis unue, kiu tumoron indukas je planto.
Post fortranĉo de la kancero-gena geno, oni povas alkroĉi la genetikan informon por ekz-e produkti penicilinon. Intertempe oni bredas bakteriojn aŭ gistojn kun modifitaj plasmidoj en grandaj kultur-konteneroj por produkti enzimojn por fari bieron, fromaĝon aŭ eĉ insulinon.
Laŭdire tiaj GM-kulturoj ne estas danĝeraj, ĉar ili povas vivi nur sub tiaj specialaj kondiĉoj, kaj ne povas moviĝi aŭ vivi sendepende de tia "supo".

**Kiel produkti GMO-plantojn:**
La homaro bredis plantojn ekde dekmiloj da jaroj. Bredado per

selektado de dezirata eco - kvanto, kvalito aŭ stabileco je severaj klimatoj - estas longjara laboro. Kiam oni malkovris eblecon labori per plantoĉeloj - anstataŭ per kompletaj plantoj - rezultoj montriĝis pli rapide, ekz-e oni kreis miksitajn planto-speciojn inter terpomo kaj tomato (kiuj ambaŭ apartenas al la sama familio de solanacoj); sed ili ne plu estas reproduktivaj. Kaj tiu metodo nur funkcias je du-germfoliaj plantoj; do, ne je la grenoj, rizo, maizo. Ankaŭ la enmeto de preparita ti-plasmido ne funkcias je la unu-germfoliaj plantoj. Finfine oni trovis teknikon uzi mikro-injektilon aŭ kun pli bona rezulto gen-kanoneton, kiu uzas oro-partikojn kiel transportilon. Sed ne ĉiu eksperimento donas la deziratan rezulton, ĉar oni ja ne vidas la molekulojn en la vivanta ĉelo. Do, oni devas fari multajn provojn, kaj uzi plurajn trukojn, ekz-e enmeti du diversajn genojn samtempe, de kiuj unu donas rapide videblan rezulton, ekz-e lumigon aŭ reziston kontraŭ herbicido, por vidi ĉu la enmetado funkciis.

### Kial produkti GMO-plantojn:

Depende de la planto oni deziras plibonigi aŭ denove krei ecojn; jen nekompleta listo, kiu donas la nomon de la produkto en citiloj, kaj la firmaon en krampoj:
- Terpomoj: pli alta procentaĵo da amelo "Amflora" (BASF)
- Fragoj: pli rezista kontraŭ frosto per fiŝ-devena geno
- Maizo: "Mon 810", rezista kontraŭ herbicido "glyphosat" = N-(Phosphonomethyl)glycin) (Roundup, Monsanto)
- Maizo kiu kombinas la herbicid-reziston kun produktado de toksino de Bacillus thuringensis (Bt-maizo).
- Kolzo: rezisto kontraŭ glyphosat (Monsanto) - por pli facile neniigi la trud-herbojn
- Kotono: kiu produktas Bt-toksinon "Bollgard"
- Sojfabo: kiu enhavas omega-3-oleon - kiu devenas de fiŝ-geno

### Ekologiaj, sanaj kaj ekonomiaj riskoj pro GMO-plantoj: venenigo - najbareco-poleno-poluo:

**Homa sano**:
GMO-sojfaboj, enhavinte genon el brazila nukso (de bertoletio) - por enmeti sulfur-havan aminoacidon, grave malsanigis homojn kiuj reagas alergie pro nuksoj. Kompreneble oni ĉesis uzi ĉi-tiun genon. (1996, firmao Pioneer filio de du Pont)

Roundup, Glyphosat (N-(Phosphonomethyl)glycin), evoluita de Monsanto, estas ampleks-mortiga herbicido. Monsanto evoluis GMO-kolzon (k.a.) kiu estas rezista kontraŭ Glyphosat, kaj vendas ambaŭ kune. Sed ĝi ankaŭ povas mortigi grundajn insektojn kaj reduktas la fekundecon de la grundo (laŭ Univ-o Buenos Aires) . Ĝi ne estas rekte venena, sed en kombino kun Tallowamin, kion oni kunmetas por pli facile enirigi la molekulon en la plantajn ĉelojn; sed tio ankaŭ funkcias je animalaj ĉeloj. Tion oni esploris en franca universitato de Caen, kaj trovis altan toksecon kontraŭ homaj ĉeloj el la umbiliko-ŝnuro. ("taz",2009-07-07, p.8)

Bt-maizo, MON 810 mem produktas la toksinon de Bacillus thuringensis - uzata kontraŭ la trud-papilio de maizo (Ostrinia nubilalis) - , se papilio-raŭpoj manĝas multe da tiaj polenoj ili mortas. Pro tio la polenoj de Bt-maizo mem enhavas la toksinon
Je kampo-esploro je la rando de naturprotekta zono oni mezuras la nombron da maizo-polenoj laŭ la distanco de la maizo-kampo, kiujn la vento transportas pli ol 500 m. La polenoj povas fekundigi normalan maizon.
Tiu toksino estas produktata de la planto dum la tuta tempo, kio signifas, ke ĝi daŭre enfiltriĝas en la grundon.  Oni ankoraŭ ne plene studis la ne-intencitan venenigon da vivantaĵo en la grundo. Kaj tia daŭra ĉeesto de toksino en la grundo kutime kaŭzas reziston. Bt kontraŭ  trud-papilioj estas natura principo, kiun ankaŭ - rekte per tiaj bakterioj - utiligas bio-agrikulturo. Do, rezisto kontraŭ la Bt-toksino estus grava interveno kontraŭ la bio-agrikulturo kaj entute kontraŭ la naturon. Pro tio oni ne rajtas uzi Bt-maizon proksime de naturprotektaj regionoj, ĉar ĉiuj papiliaj raŭpoj kiuj manĝas la polenojn de tiaj plantoj mortos, se la kvanto estas tro granda (depende de la specio).
La Bt-toksino ankaŭ troviĝas en la rikoltata maizo, pro tio la franca universitato Caen esploris nutrante longdaŭre ratojn, per tia Bt-maizo; kaj eltrovis ke ilia sano - reno kaj hepato - kaj reproduktiveco reduktiĝis.
(i.a. lau "taz" 2010-02-09, p.9; 2009-04-01, p.9)

Suker-betoj, H7-1, de germana firmao KWS, toleras la herbicidon Glyphosat [glifosat], jam permesata en Usono, sed en Germanio nur por esplorado. La herbicid-rezisto kontraŭ Glyphosat - laŭ la firmao - donus la avantaĝon ke oni bezonas malpli da herbicido kaj malpli da fuelo, ĉar per unufoja apliko ĉiuj trudherboj estos neniigitaj. Ili diras, ke ne estas risko de transdono de polenoj al ne-GMOa beto, ĉar

tiu planto florus nur je la sekva jaro.
Tamen restas la risko, ke forgesita aŭ falinta planto povas flori kaj disdoni la fremdan genetikan informon. Kaj ĝenerale eblas ke trudherboj ankaŭ iĝos rezistaj kontraŭ tiu (aŭ simila) herbicido. Por eviti tion, necesus ŝanĝi la kultivatan planto-specion, kio estas tradicie farata; sed ĝenas la agrikulturiston, ĉar per suker-betoj ili ricevas altan rikolton. (laŭ Instituto de Bio-Agrikulturo, Witzenhausen, publikigita en "taz" 2010-04-10, p.6)

**Kolzo**: Monsanto vendas kolzo-semojn kune kun la herbicido varbante per la simpla teorio, ke GMO efikas plifaciligi la laboron, uzi malpli da herbicidoj, kaj plialtigi la rikolton, ĉar la trudherboj estos neniigitaj. Je GMO-kolzo postrestas semoj kaj la vento pelas la sekigitan pajlon, kiu ofte enhavas kelkajn semojn. Konata estas la kazo Monsanto, kiu akuzis kaj postulis licenc-pagon de la agrikulturisto Schmeisser, ĉar sur liaj kampoj kreskis i.a. GMO-kolzo de tiaj semoj. Ĉar li ne semis ilin, li finfine post longa tempo gajnis la proceson. Kolzo apartenas al la specio de brasiko, kaj interkruciĝo kun alia brasiko eblas.
Mielo kiu enhavas GMO-polenojn estas taksata rubaĵo. Mielo el Kanado aŭ aliaj landoj kiuj permesas GMO-plantojn kutime enhavas GMO-polenojn, kaj pro tio ne plu estas aĉetata de konsciaj konsumantoj.

**Kotono**: Bollgard ankaŭ produktas la Bt-toksinon, sed la raŭpoj kiuj manĝas en la kapsulo post 8 jaroj da aplikado de Bt iĝis rezistemaj; Monsanto evoluis GMO-kotonon Bollgard 2, kiu enhavas plian toksinon. Sed tio signifas, ke la biologie uzata bacillus thuringiensis (Bt) en tiu regiono ne plu funkcios. Monsanto jam laboras je B3. (laŭ "taz" 2010-03-23, p.9)

### Politiko:

Aŭstrio kaj Hungario entute malpermesis uzi kaj kulturi GMO-plantojn. Argentinio, Pollando kaj Rumanio akceptas GMO. Germanio faris leĝon, ke la damaĝo de GMO-kulturoj devas esti pagata de la kulturistoj; oni rajtas kulturi GMO-plantojn - ĝis nun - nur por esplorado.

### Resume:

GMO-plantoj ne agordas kun la bio-kvalito de nutraĵoj.
Daŭra produktado de Bt-toksino venenigas alian vivantaĵon kaj la grundon.
Daŭra uzado de Glyphosat venenigas alian vivantaĵon kaj la grundon.
Pro la malebleco teni GMO-plantojn je certa loko ne eblas najbareca "paca kunekzistado" inter tiaj du diversaj metodoj; bio-kamparanoj estas minacataj de GMO-kampoj.
Spertaj agrikulturistoj scias, ke la grundo bezonas diversajn plantojn, kiel en bona herbejo; sur la agroj oni uzas sinsekvon da diversaj plantoj. Tiel ankaŭ oni evitas la tromultiĝon da specioj de trudherboj kaj trudinsektoj.

### Tute alia afero - patento al vivantaĵo:

Eŭropaj NRO-oj transdonis protest-leterojn al la Eŭropa Patent-Oficejo por bari la patentojn al vivantaĵo. Aktuale temas pri deziro de firmao havi Eŭropan patenton pri aparta geno en porkoj, kiu garantias pli fortan/rapidan kreskadon. La NRO-oj plendas ke teksto de la patento monopoligus la tutan bredado-evoluon je porkoj (kaj eble aliaj bred-bestoj).

Eta glosaro (eo = angla), pli vidu Vikipedion.
Promotoroj = promotor: loko por komenci la legadon, cele produkti mRNA
Mesaĝo-RNA = Messenger-RNA (mRNA)
Citoplasmo = Cytoplasm: solvaĵo ene la ĉelo, sed ekstere de la ĉel-kerno
restrikta enzimo = Restriction enzyme
Monsanto - oligopolisma firmao pri semoj, kiu komence produktis la toksajn substancojn Agent Orange (kiu sekvis al kruelaj difektoj je beboj), PCB (unu el la persistaj polutantoj), Dioxin (Seveso)

Literaturo kaj ret-ligoj:
"natur+kosmos", germana ĵurnalo, www.natur.de, serĉu "GMO"
"taz", Berlin, tutgermana kritikema gazeto, www.taz.de (2009-02-09, ktp)
Filmo pri kemio kaj nutraĵo (fr): http://www.nosenfantsnousaccuseront-lefilm.com/
Antaŭfilmeto, http://www.fan-de-cinema.com/films/nos-enfants-nous-accuseront.html

Vikipedio (eo), http://eo.wikipedia.org/wiki/Genetike_modifita_organismo
serĉu en via lingvo, GMO/ OGM, Pesticido, http://wikipedia.org/

Agad-grupoj:
Savu niajn semojn (de, en + 24 aliaj lingvoj), http://saveourseeds.org/
Verdpaco, www.greenpeace.org (ligo al naciaj filioj)
Eŭropa retaro pri genetika inĝenierado, http://www.genet-info.org/
Eŭropa retaro kontraŭ GMO, http://gmo-free-regions.org/
Kelkaj paĝoj de la Pesticido Agada Retejo, PAN:
PAN (de), http://www.pesticidreduktion.de/
Ne-kemia pesto-kontrolado en la tropikoj, http://www.oisat.org/
PAN Azio, http://panap.net/
PAN (en), www.pan-uk.org

SAT

OKK SAT-Kongreso

# SAT-kongreso 01- 07 - 2010 Braŝovo Rumanio

## Iom da kulturo!

Nia kongresurbo, troviĝas en lando kies kultura heredaĵo devas esti konata. Tamen kiam mi (red.) aŭdis pri Mihai Eminescu mi ne havis iamgon pri kiu oni parolis. Esperanto povas instrui al tiuj, kiuj serĉas. Por veni en etoson de baldaŭa SAT-kongreso jen la informo pri li kaj poste poemoj en traduko de la majstro mem Kálmán Kalocsay

## Mihai Eminescu (1850-1889)

La temaro de la poezia verkaro de la rumana nacia poeto, depost kies naskiĝo plenumiĝis en januaro 2010 cent sesdek jaroj, estas la meditado pri la



destino de la homa estaĵo, la kunplektigo de la homa vivo kun la ĉirkaŭanta natura medio, la amo, la historia kaj legendeca pasinteco de la rumana popolo...

Tridek naŭ jarojn vivante, Eminescu verkis nur dum sep el ili, inter 1866, kiam -deksesjara lernanto - li debutis kiel poeto, kaj 1883, kiam terura malsano forrabis preskaŭ definitive la geniulon; la laste menciita jaro estas samtempe la kulmina kaj la fina de lia verkaro.

Tre memkritika rilate sian verkaron, Eminescu estis sufiĉe "avara" koncerne la publikigon de ĝi....tial, la poeziaĵoj publikigitaj dum li estis vivanta estas relative malmultaj.

En 1902 oni malkovris entute 15.000 manskribitajn paĝojn, inter kiuj projektoj de dramverkoj en versoj, skizoj de poeziaĵoj, proksimaj al la perfekteco, kolekto de popolaj poeziaĵoj - farita dum la junaĝo de la poeto, kiam li trapasis la tutan landon - kaj eĉ disigita rimvortaro, kio multon diras pri la fortostreĉo esplori la melodiecan flankon de la rumana lingvo.

La studado de tiu nekonata verkaro finiĝis per la konstruo de nova studbranĉo nomata emineskologio.

Aperis laŭvice multe da eldonoj, precipe de poezia verkaro de Eminescu, sed ankaŭ de lia prozverkaro aŭ de ĵurnalistaj artikoloj, ĉar la poeto ne hezitis esprimi publike siajn vidpunktojn ĉu pri interna politika vivo de Rumanio, ĉu pri ĝiaj eksteraj rilatoj aŭ pri ĝia historio en eŭropa kunteksto.

Lia verkaro estas tradukita en multe da lingvoj, eŭropaj kaj aziaj; bedaŭrinde ne ĉiam la tradukaĵoj sukcesas respeguli la originalojn, ĉar - oni ja scias tion - estas sufiĉe malfacile transpasi la barojn de tio, kion oni nomas idioma kunteksto.

Sed ĝuste en la intermilita epoko, esperantlingva klasikulo, Kálmán Kalocsay, sukcesis unuafoje alproksimiĝi al la esenco de la poezio de Eminescu, per kelke da tradukaĵoj, kunigitaj en la volumo "Eterna bukedo"(1931) kaj - pli poste - en la dua volumo de la "Tutmonda sonoro"(1981).

La plej elstara nuntempa esperantlingva interpretanto de la rumana poeto estas s-ro Jozefo E. Nagy, tradukanto de la poemo "La vesperstel` ", ampleksa poezia pritrakto de la nefeliĉa ekzisto de geniuloj pro la nekomprenemo de iliaj samtempuloj.

# SOPIRO

Venu al la font` arbara
kiu vibras sur sablaĵ`,
kies fluon kliniĝinte
ŝirmas la branĉar` per kaŝ`.

Alrapidu brak-etende,
ĵetu vin al mia sin`,
la vualo, reĵetate,
de l`vizaĝo levu sin.

Sidos vi en mia sino,
solaj, solaj, vi kaj mi,
al harar` en dolĉa tremo
falos floroj de tili`.

Blanka frunt` sub haroj brilaj
klinu sin al mia brak`,
al la raba buŝo donu
dolĉajn lipojn por atak`.

Sonĝos ni feliĉan sonĝon
lulos nin en rava sent`,
kanto de soleca fonto,
kanto de karesa vent`.

En arbara harmonio
dormu zorgoj kaj dolor`,
kaj de supre, de l`tilio,
falu sur nin flor` post flor`.

# ĜIS LA STELO


Ĝis la ekaperinta stel`
Estas vojego tia,
Ke bezonegis ĝia hel`
Jarmilon ĝis ter` nia.

Delonge eble tiu sun`
Jam estingiĝis ie,
Sed ĝia lum` apenaŭ nun
Atingis nin ĉi tie.

La bild` de l`stel ŝovanta sin
Sur la ĉiel` majestas,
Ĝi estis, ni ne vidis ĝin;
Vidata, ĝi malestas.

Samtiel, kiam nia flam`
En nokt` profunda mutas,
La lum` de l`estingita am`
Nin tamen persekutas.

***Traduko* Kálmán Kalocsay**



*Braşov [braŝov'] (hungare Brassó braŝo; germane: Kronstadt (Rumanio), latine: Corona, esperante: Braŝovo) estas urbo en Rumanio kiu situas en la suda Transilvanio, 168 km norde de Bukareŝto, ĉe 45°38′N 25°35′O*
*Koordinatoj: 45°38′N 25°35′O*
*Ĝi estas la ĉefurbo de la samnoma distrikto (judeţ) kaj unu el la ĉefaj industriaj urboj de Rumanio. En 1910 ĝi havis 41 056 loĝantojn (hungaroj, rumanoj, germanoj, ĉeĥoj, slovakoj, ciganoj), en 1992 323 736 (rumanoj, 10% hungaroj). Ĝis 1919 ĝi apartenis al Hungario (Brassó vármegye). En la jaro 1749 en tiu urbo fondiĝis la unuaj du loĝioj de framasonismo en la tiama Hungarujo.*

***Informo el Vikipedio***

# Letero al ĉefministro

*André kaj Colette Weiss*




André kaj Colette Weiss
Lotissement Ader
64250 Louhossoa

**SAT-Esperanto**

La 15-an de aprilo 2010

al Sinjoro Ĉefministro
Hôtel de Matignon
57 Rue de Varenne
75700 Paris

Temo : Apliko de la Konvencio de Oslo.

Sinjoro Ĉefministro,

Ni skribas al vi kiel la respondeculoj de la pacista frakcio de SAT-Esperanto, membro de CMC (Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵoĵetoj el bomboj), internacia organizo, kiu kunigas proksimume 350 membrojn en 90 landoj. Tiuj organizoj kunigitaj en la koalicio kontraŭas la uzon, la fabrikadon kaj la stokadon de pafaĵoĵetoj el bomboj.

Efektivigita studaĵo de 2 organizoj de la koalicio : IKV Pax Ckristi kaj Netwerk Vlaanderen montras, ke, en la mondo, 146 financaj institucioj en 15 landoj provizas la sep plej gravajn mondajn fabrikojn de pafaĵoĵetoj el bomboj per pli ol 43 miliardoj da dolaroj por investadoj aŭ financaj servoj. Tiuj sep plej gravaj mondaj fabrikoj estas : Alliant Techsystems ATK (Usono), Hanwha (Korea Respubliko), L-3 Communications (Usono), Lockheed Martin (Usono), Poongsan (Korea Respubliko), Singapore Technologies Engineering (Singapuro), Textron (Usono).

Inter la 146 financaj institucioj, kiuj investas ĉe la fabrikoj de pafaĵoĵetoj el bomboj, 44 troviĝas en landoj, kiuj subskribis la Konvencion de Oslo, kaj 15 troviĝas en 4 landoj : Francio, Germanio, Hispanio, Japanio, kiuj subskribis kaj ratifis la Konvencion de Oslo. Laŭ niaj informoj, la asekura societo AXA kaj la banko BNP-Paribas estus inter la financaj francaj institucioj, kiuj partoprenas per investadoj ĉe fabrikoj de pafaĵoĵetoj el bomboj.

La pragrafo « c » de la artikolo 1 de la Konvencio de Oslo subskribita kaj ratifita de Francio instruas ke :
Ĉiu ŝtato devontigas sin, kia ajn estos la cirkonstancoj, al :
… …
neniam helpi, subteni aŭ instigi iun ajn devontigi sin al aktivecoj malpermesitaj al Ŝtato konforme al la Konvencio.

Sinjoro Ĉefministro, ĉu per tiu artikolo la Registaro povas interveni ĉe la du financaj francaj institucioj antaŭcititaj, por ke ili ĉesigu, sur la franca teritorio, aktivecojn, kiujn la Ŝtato kondamnas ratifante la Konvencion ?

Esperante ke ni estos aŭskultataj, bonvolu akcepti, Sinjoro Ĉefministro, la esprimon de nia tre alta konsidereco.

# Pri Haitio

JoMo Aneko

## Haitio, tri monatojn poste

Antaŭ tri monatoj, mortis dum la tertremo du junaj Haitianaj esperantistoj: Charles Livenson (18 jaroj) kaj Pierre Robenson (15 jaroj). Falegis la kvaretaĝa domego kie ili loĝis en popola kvartalo apud Portoprinco.

Respektsaluton al ili !

**Kia estos la rekonstruado, promesita de la Haitiana registaro kaj de ĝiaj alilandaj amikoj?**

En la sama domego loĝis tri aliaj esperantistoj: du junuloj kaj unu SAT-ana plenkreskulo, Claudel. Ili lernis Esperanton kune. La du junuloj vivas, kaj post la tertremo ili forlasis Portoprincon. Ankaŭ vivas Claudel, sed lia patrino mortis kaj lia edzino (kiu komencis lerni Esperanton antaŭ tri jaroj) estis grave vundata. Ili certe perdis kvazaŭ ĉion.

Kun junuloj Claudel rekomencas edukajn agadojn, inkluzive pri Esperanto. Li bezonas KD-diskojn (Lernu, Elektronike Esperanto...), librojn, filmojn (en ajna lingvo) ktp. Ekde multaj jaroj, li vigligas malgrandan asocion, kiu nomiĝas CERAV (CEAS en esperanto: Centro por Edukado kaj Aŭdovida Serĉado). Post la tertremo, pluraj amikoj de Claudel estigis asocion en Francujo, por helpi CERAVon, aparte ĝiajn popoledukagadajn projektojn en la direkto de la viktimoj, rifuĝitaj en teksaĵaj kampadejoj. Inter aliaj, du esperantistoj partoprenas en tiu asocio, kiu nomiĝas "Zanmi Zetwal Ayiti" (Amikoj de la Haitiaj Steloj). Kial tiu stranga nomo? Ĝi referencas al la viktimoj, kiuj subĉiele dormas, al iliaj songoj kaj esperoj. La viktimoj ne bezonas nur tendojn, manĝojn kaj kuracadojn. Mensajn nutrojn ili bezonas ankaŭ. Kaj unue respekton.

## Okazo negoci

"Ili traktas nin kiel bestojn!", deklaris viro freŝdate forpelita de la polico kun 6000 aliaj viktimoj, el granda futbalo-stadiono. Ili loĝis tie ekde la tertremo. Ilia kulpo? Verŝajne transvivis la tertremon. Ĉar ludi piedpilkon estas prioritate! Kia estos la rekonstruado, promesita de la Haitiana registaro kaj de ĝiaj alilandaj amikoj? Eble ja pli da maljustaĵoj por la malriĉuloj.

En tiujara tutmonda ekonomia forumo, Bill Clinton petis la multnaciajn firmaojn rigardi la investadon en Haitio kiel "okazon negoci prefere al asistado". Jam en ĝia rekonstruada plano, la Haitiana registaro devontigis ŝanĝi leĝon por faciligi alilandajn investadojn. Ĝi ankaŭ promesis favori apartajn areojn kie eksportuzinestroj ĝuos gravajn privilegiojn.

Jam lastan jaron, antaŭ la tertremo, la Haitiana prezidento, René Préval, rifuzis leĝon aprobitan de la parlamento pri la minimuma tagsalajro (4 eŭroj). Finfine la parlamento aprobis du minimumajn salajrojn: nur 2,5 eŭroj por la laboristoj de la grandaj eksportuzinoj, kaj 4 eŭroj por la aliaj laboristoj. Miloj da studentoj kaj eksportlaboristoj manifestis kune lastan someron kontraŭ la prezidenta decido.

## Urĝa stato

Ĉu ili povos manifesti denove ? Neniu tion povas aserti. Ĉar ĉirkaŭ 15 000 alilandaj militistoj kontrolas nun en Haitio. Kaj la parlamento ĵus aprobis leĝon, kiu plidaŭrigas "urĝan staton" deciditan de la registaro post la tertremo. Tiu leĝo certe ne protektas la fundamentajn rajtojn. Ĝi krome ebligas starigi apartan komisionon, kiu prizorgos la "rekonstruadon" de Haitio. En tiu komisiono rajtos voĉdoni 10 haitianoj kaj 12 reprezentantoj de alilandaj registaroj aŭ internaciaj financaj institucioj.

Kunprezidos la komisionon la Haitiana ĉefministro Jean-Max Bellerive kaj Bill Clinton. Kelkaj parlamentanoj klarigas, ke sen tiu komisiono la alilandaj registaroj rifuzus doni monon. Ĉu estas seninteresa helpo?

Por sendi lernmaterialon al Claudel kaj Haitianaj samideanoj:
- bvu sendi KDojn kaj DVDoj al : ZZA, boîte 25, 50 rue Galliéni, 92240 Malakoff, Francujo. Eblas sendi tien ankaŭ monon por helpi la popoledukadajn projektojn de CERAV: ĉekojn al la ordono de "ZZA".
- bvu senpere sendi librojn al CERAV. Por scii la numeron de la leterskatolo, kiun CERAV baldaŭ disponos apud Portoprinco, bvu sendi vian (ret)adreson al ZZA (zzayiti@gmail.com). Dankegon !



SAT

# Ekzistas kaŝita agadoplano

*Kristina Lindquist.*

*Intervjuo de Kristina Lindquist kun la esploristo Anders Kjellberg pri kiel la sveda dekstrula registaro malfortigis la sindikatojn.*

La sveda sindikata movado, kiu estis unu el la plej fortaj en la tuta mondo, nun perdis membrojn dum la lastaj jaroj en amplekso kiu ne estis videbla post la "Grandstriko"1909. Unu kiu longtempe sekvis la sindikatan evoluadon en Svedio estas Anders Kjellberg, docento en sociologio je la universitato de Lund. Kiam "Arbetaren Zenit" telefonas al li por demandi kial la membroj forlasas la sindikatojn li substrekas ke oni devas fari diferencon pri la nunaj membroperdoj kaj pri longperspektiva ĝenerala evoluad-tendenco.

-Kun mallonga perspektivo temas senhezite pri la grandega altigo de la kotizo al la a-kaso - ne eblas klarigi la aferon alimaniere. Pli frue, post la mezo de la 1990-jaroj, temis pri perdo de plejmulte unu procenton po jare. Nun la sindikatoj perdis ses unuojn dum du jaroj. La utileco por la membro estis neŝanĝita dum la kosto estis plialtigita treege subite.

**Ĉu la registaro estus povinta antaŭvidi tion ĉi?**
-Jes. Estis facile antaŭvidi ke estos multaj kiuj forlasos la a-kason kaj ankaŭ la sindikaton. Esploristoj, ankaŭ mi mem, avertis pri membroperdoj antaŭ ol la reformo estis efektivigata. Ŝtata memorando de 2005 antaŭvidis esence pli malgrandan aniĝon al la a-kasoj se la kotizoj altiĝus multege.

**Kiel vi interpretas tion**?
- Oni ne povas eksterlasi ke ekzistas registara kaŝita agadplano. Ke estis konscia strategio malfortigi la sindikatojn.

-Tio kion oni eventuale prikalkulis estis ke multaj restus membroj en la a-kaso kaj forlasus la sindikaton. La tiam reganta tendenco estis ja ke la rektaniĝo al la a-kasoj de longtempe plimultiĝis. Sed baldaŭ montriĝis ke estis pli multaj kiuj forlasis la sindikatajn a-kasojn ol tiuj kiuj forlasis la sindikatojn.

Dum la jaroj 2007 kaj 2008 la sindikataj a-kasoj perdis 400.000 membrojn, dum la sindikatoj perdis 235.000 membrojn. Tio signifas ke multaj rektaniĝintoj ankaŭ forlasis (Red: *ambaŭ*?). Ĉitage kostas 430 kr. monate esti membro de "Hotel" kaj Restoracidungitoj" kaj kune kun la sindikata a-kasokotizo la sumo iĝos preskaŭ 700 kr. monate. Pro tio ne estas strange ke kelkaj forlasas la sindikaton .

- Komence la kotizoj estis altigitaj por ĉiuj sed poste okazis pliigita dupolusigo inter diversaj kasoj. Kiam la kosto pli evidente estis kunkupligita al la nivelo de la senlaboreco ĝi tendencis tio tiel ke tiuj kiuj gajnas plej pagas malplej kaj tiuj kiuj havas malaltajn salajrojn pagas plej multe - kiel formo de regresiva imposto. La membroj de la akademiula a-kaso pagas 90 kr. monate.

**Ĉu la membroperdoj sekvas la kotizaltiĝojn en la diversaj branĉoj?**
- Jes, en larĝa perspektivo, la"Hotel" kaj Restoraci-sindikato" perdis dum du jaroj ĉiun trian membron, dum estas tute alie ĉe la Saco-asocioj. Tio certe ne nur dependas de la a-kaso, sed ankaŭ de tio ke ekzistas pli da akademianoj ĉitage. Sed ne estas strange ke multaj LO-asocioj perdas membrojn kiam la kotizoj estas tiom altaj. (LO estas la plej granda sindikato*) (Socialdemokrata).*

**Kaj se oni rigardas longperspektive?**
La kunmetado de la laborfortoj ŝanĝiĝas tiel ke la parto de dungitoj malmultiĝas en la publika sektoro kaj pliiĝas en la privata, kie la organizadgrado estas pli malalta. Se ni rigardas al la privata sektoro tiam ni vidas ke la industrioj malgrandiĝas favore al la privataj servadentreprenoj, kie malpli da dungitoj estas sindikate organizitaj.

- Alia moviĝo estas rekte de publika sektoro al la privata, kie la gemaljunula loĝado estas evidenta ekzemplo. Kiam privataj entreprenistoj transprenas entreprenon la dungitoj transiras de la sektoro kun la plej alta organizgrado ĝis ĝi kun la plej malalta. Tie povas ankaŭ temi pri tio ke la dunganto volas havi kolektivan interkonsenton. Ankaŭ malreguligoj havas siajn efikojn. SAS (Sveda Aerlinia Sistemo) havas fortajn sindikatojn dum Ryanair ne volas okupiĝi nek pri sindikatoj nek pri kolektivaj laborkontraktoj. Tie estas ja bezono de sindikata laboro ĉar ili pelas la personaron tre forte.

- Alia longperspektiva eveluadtendenco estas ke pluraj havas tempolimigitajn dungitecojn kun malfortaj ligoj al la labormerkato. Se la laboro estas alternata de senlaborecperiodoj tiam oni ne sentas sin aparte motivigita organizi sin sindikate.

- Ni ankaŭ povis vidi malfortiĝojn de sindikataj organizadoj en la laborejoj, kio povas iĝi al malbona cirklo kie novdungitoj ne renkontas sindikatajn reprezentantojn. Kiam la entreprenoj kaj administrantaroj home malmultiĝas ekzistas malpli da tempo por okupigi sin al sindikata laboro. La bezono estas eble pli granda ol iam, sed la laboro pli malfacila efektivigi.

- Krome ekzistas pli kritike provanta sinteno al sindikata membreco, aparte ĉe gejunuloj. Homoj starigas la utilecon kontraŭ la kostoj laŭ alia maniero ol pli frue kaj ekzistas verŝajne ankaŭ relative granda malsciado pri kio estas sindikato kaj pri kio ĝi povas efektivigi.

**Kio iĝas la efikoj kiam la sindikatoj malfortiĝas de tio?**
- Povas aperi, sensignifaĵoj en la kolektivkontrakta sistemo tiel ke iĝas malfacile fari interkonsentojn en certaj branĉoj, kio signifas ke por multaj el tiuj kiuj havas plej malbonan vivon la vivsituacio ankoraŭ pli malboniĝas. Se multaj laborejoj ekzistas sen sindikataj interkonsentoj tio tendencas suben premi la salajrojn por ĉiuj en tiu ĉi branĉo.

-Sed ankoraŭ estas multaj laborkontraktoj subskribitaj en Svedio kaj al tio kontribuas ke la dungantoj havas tre altan gradon de organizado, kio fakte altiĝis dum la lastaj jaroj. Laŭ la vidpunkto de la sindikatoj tio ĉi estas negative por la fortokondiĉoj inter la partioj, sed pozitive por la kolektivaj interkonsentoj.

**Ĉu ekzistas iuj historiaj paraleloj al la granda sindikata membroperdo?**
-Tiam ni devas reiri al la Grandstriko 1909, kiam la sindikatoj spertis grandegan malvenkon. Multaj iĝis elrevigitaj kaj forlasis la sindikatojn kaj kunlige de tio SAe (La A-sindikatistoj) estis fondita. Dum la unuaj jaroj de 1920 ni havis profundan depresion kiu kondukis nin al certa malprogreso, sed alie la konjunkturo altiĝis principe seninterrompe ĝis la fino de la 1980- jaroj. Tiam estis grandege alta konjunkturo, la senlaboreco en la stokholma regiono estis nur unu procento kaj multaj opiniis ke ili povis prizorgi sin mem. Kiam ni poste venis en profunde




malalta konjunkturo tiam la aliĝo al la sindikato ree plimultiĝis, ĝis 85 procentoj 1993. Post tiam la aliĝoj malpliiĝis. Tion kion ni ĉitage vidas povus iĝi la unua malalta konjunkturo post la 1920-jaroj, tie kie ne moviĝas supren.

**Ĉu oni povas pritraki la svedajn fortajn sindikatojn de la 1900-jaroj kiel historian parentezon?**
- Tiaokaze ĝi estas longa parentezo, ĉar estas dum tre longa periodo ke Svedio, internacie rigardate havis tiom altnombran sindikatan aliĝgradon. Sep el dek salajruloj estas daŭre membroj en sindikato kaj Svedio havas, kune kun Danio kaj Finlando, la plej grandan sindikatan aliĝon en la mondo. Estas tamen tro frue paroli tutcertece pri la estonteco.

**Kelkaj opinias, same kiel la aŭtorino Liza Marklund, ke la "sindikatoj estas intereso por kolektivoj kiuj konstruas murojn kontraŭ malriĉulojn kaj eksterulojn."**
- Estas asertite en la debato ke Las, la leĝo pri dungiĝprotekto, malhelpas gejunulojn iĝi partoj en la labormerkato kaj laŭ mia kompreno estas pro tio ke multaj pli aĝaj personoj ne estas maldungitaj je malpliigoj de la laboristoj. Sed la labordungantoj ne devus heziti dungi gejunulojn ĉar tiuj kiuj laste estas dungitaj tiuj ankaŭ devas unue forlasi la laboron kiam oni devas redukti la dungitaron. Krome la malgrandentreprenistoj rajtas fari escepton por du personoj de la vicdungiĝreguloj.

- Sed certe dominas la firmaj dungadoj en la sindikatoj, ankaŭ se ekzemple en Handels kaj Kommunal (komerco kaj komunumo) ekzistas multaj kiuj estas parttempe dungitaj. En la aĝulgrupo 16 - 24 jaroj estas la sindikata aniĝo nur 36 procentoj, kaj tiam mi ne kalkulis la plentempstudantojn kiuj laboras dum semajnfinoj kaj similaj okazoj. En tiu ĉi aĝulgrupo laboras ok el dek en laboristaj profesioj kaj multaj de ili en la privataj servoentreprenoj kie la organizada grado estas malalta. Tio estas maltrank-viliga afero laŭ sindikata vidpunkto.

**Kiel la sindikatoj do renkontiĝu kun la ŝanĝiĝinta labormerkato?**
Tio estas defio, sed ekzistas bezono ke io estu farita. Mi kredas ke la sindikatoj devas efektivigi pli da organizad-kampanjoj, kion oni ne bezonis fari antaŭe en Svedio. Esploradoj montras ke multaj gejunuloj volonte akceptas sindikatan taskon se ili estas aldemanditaj - ne ekzistas rekte iu ideologia kontraŭstaro.

- Kiam temas pri malbonelmetitaj grupoj tiam ekzistas definitive tiuj pri kiuj LO ne aparte multe okupigis sin, ekzemple la senpaperuloj. Sed estas ja tre malfacile pri la organizado kaj la kolektivkontraktoj, ĉar dungintoj kiuj uzas senpaperulojn havas multe fortan pozicion rilate al tiuj kiuj riskas esti elĵetitaj el la lando. Sed tio estas treege grava afero, kaj ekzemple Hispanio multe investis kiam rilatas al la senpaperuloj.

*El Arbetaren Zenit 37/2009, intervjuis Kristina Lindquist. traduko el la sveda lingvo de SLEA -anoj*

SAT

# Kontraŭ G20-a Pinta Konferenco neegaleca - nedemokrata !

## Raporto pri Korea kaj Japana Aktivista Kunsido de Esperanto 2010 kaj konversacio kontraŭ G20-a

***G20-a ŝovas al popolaro respondecon kaj koston de financa krizo kaŭzita de ŝtatoj kaj entreprenoj, kaj minacas homan vivon por profito de kapitalo.***

Ekde la 19a ĝis 21a de marto, 2010, dum 3 tagoj okazis Korea kaj Japana Aktivista Kunsido de Esperanto kaj konversacio kontraŭ G20-a en Popolamasa Domo en Mangwon-dong, Mapo-gu, Seulo. El Japanio 10 aktivistoj kaj ĉirkaŭ 30 koreaj aktivistoj partoprenis. Ĉi tiu evento jam havas kelkjaran historion. En 2007, japanaj aktivistoj proponis komunan batalon kontraŭ G8-a Pinta Konferenco en Esperanto-kunsido. Kaj en 2008 ĉirkaŭ 15 koreaj aktivistoj partoprenis en batalo kontraŭ G8-a okazita en Japanio.

Ekde tiam oficiale komenciĝis solidareca agado. Post tiam japanaj aktivistoj organizis protestan agadon kontraŭ korea ambasadorejo en Tokio nome de 'Ne pardonas masakron en Yongsan' pri la tragedio en Yongsan, 2009. Kaj sekve koreaj aktivistoj protestis kontraŭ forpelada politiko de senhejmuloj el Parko Miyasita en Tokio pro la privatigado de la parko al entrepreno Nike.

Surbaze de ĉi tia solidareca aktivado inter koreaj kaj japanaj aktivistoj, ĉi-foja kunsido okaziĝis por palpserĉi komunan batalon kontraŭ G20-a Pinta Konferenco okazota en Seulo, en la 11a - 12a de novembro, 2010, kaj APEC-a Pinta Konferenco okazota en Jokohamo, en la 13a 14a.

### Aŭskulti la sperton de kontraŭbatalo kontraŭ G8-a Pinta Konferenco okazinta en Hokkajdo, 2008

Aktivisto de Sangafratina Solidareco, ŝia nomo estas Dopehead Zo, kiu partoprenis kontraŭbatalon kontraŭ G8-a el Koreio, prezentis "La Kontraŭbatalo kontraŭ G8-a Pinta Konferenco, kio estis bazitaj sur amikeco kaj solidareco"-n kaj komenciĝis konversacio. Mi ne publikigos nomojn de japanaj aktivistoj ĉi tie. Japanaj aktivistoj preparis diversmaniere pli ol 1 jaron antaŭ G8-a Pinta Konferenco en Hokkajdo, 2008. Eksterlande ili organizis informan turneon vizitante kelkdekajn landojn por propagandi batalon kontraŭ G8-a, aktivis por konstrui tendumon internacian brigadan ĉirkaŭ lago Toya, kie estis pinta konferencejo, administris komunikilan centron de G8-a, faris propagandaĵojn, financis kaj provizis nutraĵojn, ktp.

La plej malfacilaj partoj en ilia sperto estis pri polica subpremado kaj agada taktiko en la loko. En la procezo de la agado sekvis aresto, rifuzo de enlandigo, malliberigo. Kaj post aresto maksimume 23 taga enkarcerigo eblas en Japanio, do en tia situacio eĉ kverelo okazis inter japanaj aktivistoj kaj eŭropaj aktivistoj. Mi povis aŭdi aflikton de japanaj aktivistoj, kiuj ne estis aktive liberaj en polica ŝtato, Japanio. Iu aktivisto devis sole prepari internacian agadan manifestacion, kaj ĉiuj superhome devis fari pli multajn laborojn ol mem fareblajn adekvatajn laborojn. Post farado de ĉi tiuj laboroj multis sekvaj simptomoj, tamen ĉiuj fieris, ke ili faris internacian komunan agadon kontraŭ G8-a Pinta Konferenco, kiu neas demokraton, kontraŭ novliberalismo, kiu disvastigas malriĉecon kaj teruron.

### Palpserĉo por egaleca interkomunikado, Aktivista Kunsido de Esperanto

En la procezo de kontraŭbatalo kontraŭ G8-a Pinta Konferenco diversaj problemoj estis rimarkitaj, tamen inter ili precipe malegaleca interkomunikado estis indikita. En la tendumo de kontraŭ G8-a Pinta Konferenco estis uzita oficial angla kaj japana. Se iuj ne povas uzi la lingvojn aŭ ne lerte, nature ili estis fremdigitaj el batalo aŭ devis ludi pasivajn rolojn. Tial en venontaj internaciaj movadoj ni proponis uzi Esperanton kiel pli egalecan interkomunikadon.

Paz parolis, ke Esperanto estas monda komuna lingvo, kaj faris

simplan gramatikan prelegon anoncante metodon por lerni kaj uzi Esperanton, kiu konsistita el facilaj kaj senesceptaj reguloj.

Kamarado Naoto de Libera Esperanto-Asocio en Hokkajdo parolis, ke ĉiuj lingvoj estu egalrajtaj. Kaj li proponis, ke tiam parolantoj kun aliaj patrolingvoj komunikadas, kiam estas prefere, ke ili parolu la trian lingvon. Precipe li traktis pri sperto, tiam eŭropaj partoprenintoj en movado kontraŭ G8-a parolis siajn insistojn per 'vireca anglalingvo', kiam pri tio oponintoj ne povis paroli opiniojn pro nur lingva problemo.

Kara parolis pri historio de interŝanĝo kaj movado inter esperantistoj de Koreio, Japanio, Ĉinio en 1920 - 40aj jardekoj. En ĉi tiu historio ni povis lerni, ke per Esperanto en orientazio vigla aktivista solidareco fariĝis jam en la epoko de Japana Imperiismo.




La 20a de marto estis la 7a rememora tago de Iraka Milito, do okazis kontraŭmilita koncerto "Milito ne plu !". Ni direktis al kontraŭmilita koncertejo antaŭ universitato Hongik kunprenante stangetojn skribitajn esperante, japanalingve, korealingve. Sed en tiu tago, kiam tro blovis flava sablovento, arestominaco de policoj pri japanaj aktivistoj kaj polica obstaklo de la evento tre kolerigis nin. Sed ni ĝis la fino partoprenis en la evento kaj iris al eta Yongsan antaŭ univ. Hongik 'Duriban' kaj partoprenis sabatan muzikfeston. Kaj japanaj aktivistoj ludis gitaron kaj drumon kantante por transdoni solidarecan mesaĝon.

### Komuna agado kontraŭ G20-a, ekde nun komenciĝas !

Post komuna batalo kontraŭ G8-a tiutempa G8-a Komunikila Reto ŝanĝiĝis kiel Azia Komunikila Aktivista Reto "Champon". Dojong kaj japana komunikila aktivisto kune klarigis, kiel komunikilaj aktivistoj evoluigis solidarecan aktivon kune okazigante ĉiujaran tendumon. Ankoraŭ nun aktivo estas ne tre forta, tamen Azia Komunikila Aktivista Reto faras debaton por komuna kontraŭbatalo kontraŭ G20-a kaj APEC.

Sekve politika planulo de Popola Solidareco de Sociprogreso, KU Ĝun Mo prezentis historion de G20-a Pinta Konferenco, temon de la Seula G20-a Pinta Konferenco 2010, proponon de batala direkto. Li proponis, ke enlande oni faru popolan batalon kontraŭ financa tutmondigo kaj novliberalismo, kaj en sfero de orientazio oni plilarĝigu solidarecon inter alternativaj tutmondigaj movadoj.

Ĝenerala Sekretario de Popolamasa Domo, AN Seong Min klarigis pri reto de loka baza (herboradika) movado en distrikto Mapo. Li rakontis pri Seongmisan Maeul (pseŭda vilaĝo), Kandelluma Solidareco en Mapo, Sendependa Artista Asocio, rekonstruada problemo kiel Duriban, Okcidenta Neregula Laborista Centro, Laborista Reto post striko de supermerkato Homever, loka elekto en junio kaj elekto por edukestro, ktp.

Fine ni faris diskuton, demandon kaj respondon pri konversacio dum 3 tagoj. Mi skribas jene nur kelkajn el diversaj opinioj.

1. Faru sistemon por interŝanĝi aktivistojn en alternativaj spacoj: Popolamasa Domo, Gastodomo Malplena Domo, k.a.
2. Por komuna kontraŭbatalo kontraŭ G20-a kaj APEC inter Koreio kaj Japanio en ambaŭ landoj oni devos okazigi grandan manifestacion.
3. Kun rekta agado estas bezonata klopodo por akiri subtenon de lokaj loĝantoj.
4. Batalantoj bezonas planon kaj direkton por informi sin per sendependaj komunikiloj. La video pri aresta procezo de polico kaj arestitoj estas ĉefa solidareca agado de komunikilaj aktivistoj.
5. Necesas slogano pri G8-a, G20-a, k.s. kiuj donus influon en la vivo de ordinaraj popoloj. Internacia slogano, enlanda slogano, loka slogano devas organike kunmetiĝi.

Komuna batalo kontraŭ G20-a ankoraŭ nenio estas decidita. Tamen ĝuste de nun ni konstatas kontraŭpopolecon kaj maldemokratecon de G20-a tutmonde kaj komenciĝas agado. El nia koro !

SAT

# Ĉu preterpasi la kapitalismon per ekonomia demokratio?

La 7an de marto 2010 la Socialdemokrata Partio de Svisio (SP) prezentis al la publiko la malneton de ĝia nova programo. La aŭtoro de tiu kvindekpaĝa teksto, Hans-Jürg Fehr, estas historiisto, laboris kiel mezlerneja instruisto, redaktoro kaj eldonisto kaj estis partia prezidanto de 2004 ĝis 2008.
La nova programo, kiu estis prilaborata dum la pasintaj ses jaroj, anstataŭas la programon de Lugano el la jaro 1982. La centraj punktoj estas: libereco, bazaj rajtoj, socia justeco kaj ekonomia demokratio. Al tiu lasta la SP atribuas grandan signifon. La konceptaĵo „ekonomia demokratio“ kvazaŭ anstataŭas la malnovan formulon de “preterpaso de la kapitalismo“. La SP volas fortigi la publikajn servojn, plivastigi la kooperativojn kaj labori por plia kundecidado de la dungitoj en la entreprenoj. Ĝi ankaŭ postulas la rajton de voĉdono kaj elektiĝo por eksterlandanoj kaj ĝeneralan socialan asekuron anstataŭ la nunaj tri unuopaj asekuroj pri invalideco, maljuneco kaj senlaboreco. La programo substrekas la internaciismon, ĉar pro la tutmondiĝo kaj eŭropiĝo necesas sekvi la internaciisman tradicion. La limoj de la nacia agado ĉiam pli evidentiĝas kaj la SP estas por aniĝo de Svisio al Eŭropa Unio. La prezentita malneto estas propono de la partia direkcio. La fina rezolucio akceptiĝos post diskutado la 30an de oktobro 2010 dum asembleo en Laŭzano.

Kritikoj de tiu programo kompreneble varias laŭ la respektiva politika kampo de la kritikantoj. Por iuj oni trovas nenion novan kaj estas ripeto de konataj formuloj, kiuj montriĝis nerealaj. Por aliaj ĝi ne forgesas la historiajn valorojn de socia justeco kaj montras alternativojn al la novliberalisma ideologio de sin mem regulanta kapitalismo. Malgraŭ la nuna ekonomia krizo, la SP perdas seĝojn dum balotoj en komunuma, kantona kaj federacia parlamentoj. Oni aŭdas riproĉojn, ke la SP ja havas inteligentajn kapojn, sed ne esprimas sin sufiĉe simple por la tradicia klientaro de la salajruloj, por kiuj la sloganoj de la popolisma dekstro ksenofoba ŝajnas pli allogaj. Iuj kritikas ke en la programo mankas klara sinteno rilate sekurecon kaj enmigradon. Por Hans-Jürg Fehr, la programo devus desegni vizion por la estonta generacio kaj ne elĉerpe analizi la erarojn faritajn en la pasinto. La SP estas tamen ankoraŭ laŭnombre kaj laŭinflue la dua plej granda partio en Svisio.

### La sep partiprogramoj de la SP

1888: Fondiĝo de la partio kaj unua programo. Centra postulo: socialigo de la ekonomio fare de la popolo. Ĉi tiu celo estu atingota per reformoj kaj ŝtatigo.
1904: Surfunde de duraj laborkonfliktoj kaj strikoj la SP donas al si klasbatalan programon marksisman.
1920: Sub la influo de la rusa revolucio, de la ĝenerala striko tutlanda kaj la vaste disvastigita sociala mizero post la Unua Mondmilito oni akre kritikas la imperialismon kaj propagandas por strikoj kiel batalrimedoj kaj por la diktaturo de la proletaro.
1935: Post la disvastiĝo de la faŝismo kaj nacisocialismo en Eŭropo kaj la potencopreno de la nazioj en Germanio, la SP rezignas pri la nocio de la diktaturo de la proletaro kaj subtenas la nacian defendon. Ĝi eniras koalicion kun la politika mezo kaj en 1943 Ernst Nobs iĝis la unua federacia konsilisto socialista (ministro en la registaro).
1959: Surfunde de la malvarma milito kaj de la ekonomia progreso la nova programo celas per reformoj la plenan dungitecon, justecon kaj socialan sekurecon.
1976/1982: La integrado de novaj sociaj movadoj (68a maldekstro, feministinoj, mediprotektantoj) kaj la recesio de 1974-76 kondukas al revizio de la programo, kiu formulas la preterpason de la kapitalismo. La programo de 1982 konfirmas tiujn celojn kaj aldonas pluajn socikritikojn.
2010: La SP volas unuavice kontraŭbatali la negativajn sekvojn de la tutmondiĝo. La kapitalismo estu preterpasota per ekonomia demokratio. Protektado de la klimato kaj forigo de la armeo estas postulataj.

Programo rete legebla (franca, itala, germana): http://tinyurl.com/y34kovc

SAT

# Donacoj al SAT dum la unuaj monatoj de 2010

| | |
|---|---|
| Anonime FR | € 125 |
| Anonime FR | € 58 |
| Anonime FR | € 700 |
| Anonime FR | € 125 |
| Nourmont C | € 8 |
| Barkoviĉ K | € 52 |
| Schram J | € 340 |
| Carleos | € 54 |
| Paech | € 98 |
| Gudskov N | € 8 |
| Aŭstrate | € 6 |
| Quillaŭd | € 20 |
| Lemarchand P | € 5 |
| Kessous D | € 42 |
| Labvergne M | € 5 |
| Leprevost A M | € 5 |
| Bouchet E | € 6 |
| Redoulez M | € 3 |
| Sadier | € 2 |
| Ternant J | € 9 |
| Gogman | SEK 1 |
| Hammarberg | € 20,55 |
| Dejean N | € 52 |
| Huzimaki Keniti | jenoj 1600 |
| Kazawa Kinuko | jenoj 3200 |
| Makino Tetu | jenoj 4100 |
| Morita Akira | jenoj 1600 |
| Oikaŭa Jukiko | jenoj 200 |
| Oosima Siniti | jenoj 800 |
| Tanaka Kazuki | jenoj 600 |
| Tanigaŭa Takeŝi | jenoj 1600 |
| Tezuka Toŝio | jenoj 1600 |
| Yamamoto Sintaro | jenoj 3300 |
| Yazaki Yoko | jenoj 1600 |
| Huĝimoto Tacuo | jenoj 4200 |

Nova dumviva membro: Kobayasi Utako

**Kotizon, grava rimarko.**

"- Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas Sennaciulon plus ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.
- El la indikita sumo, 40 % estas la kotizo kaj 60 % la abono.
- Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.
- Pagante la sumon de 57 eŭroj, nemembro povas jaraboni Sennaciulon plus ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo."

SAT

# KOMUNISTA Frakcio

Bulteno

La unua kunveno traktos raportojn pri la situacio kaj laboro en la diversaj landoj. La laboro de la frakcio mem ankaŭ devas esti diskutita.
En la dua (kaj eble tria) kunveno mi esperas aranĝi renkontiĝon kun reprezentantoj de lokaj komunistoj.

Ron Lynn
Prezidanto

*jakvo*

# Ĉu pri kongresoj kaj klasbataloj?

Dum SAT-kongreso en Milano, mi aŭdis proponon por ke estonte SAT kaj UEA havu komunan kongreson.
Mi scias ke SAT havas ĉiun jaron en monato julio aŭ aŭgusto jarkunsidon dum kiu la membroj kiuj ŝatas partopreni ĝin, decidas pri agadoj de SAT. Dum la jarkunsido la Plenum-Komitato prezentas sian raporton kiun la membroj povas aprobi aŭ malaprobi.
La jarkunsido estas afero kiu nur rilatas SAT-on, la asocion kaj ĝiajn membrojn.
SAT neniam havis ion por kaŝi, sed la jarkunsido devas okazi en trankvilo de la asocio en sereneco pri kiu la membroj decidas.

Fari ĉi tiun jarkunsidon dum ekzemple Universala Kongreso de Esperanto aŭ dum Kongreso de Universala Esperanto Asocio, aŭ dum kongreso de La Civito, neniam povas esti saĝa decido.

La strukturo de SAT ne estas strukturo de asocio kiu propagandas Esperanton aŭ disvastigas Esperanton, aŭ asocio kies plej grava ekzistokialo estas kritiki aliajn asociojn. SAT estas asocio kun tre fiksa celo. Celo kiu estas tre klare priskribita en la statuto. Estas ĝuste tiu statuto kiu distancigas nin de asocioj kiuj disvastigas Esperanton.
Tio ne estas kritiko al UEA nek al La Civito nek al aliaj 'burĝaj' aŭ dekstre tendencaj asocioj.

Ĉu tio signifas ke SAT estas maldekstra tendenca asocio? Absolute ne! Eble klasbatala? Mi povas aŭdi la voĉon de kamarado Gilbert Ledon ĝis ĉi tie. NE! SAT ne estas klasbatala asocio. SAT subtenas asociojn klasbatalajn, sed laŭstatute SAT estas kleriga asocio.

Por fari sian laboron SAT kaj ĝiaj membroj uzas la universalan lingvon Esperanto. Tiuj, kiuj studis la historion de SAT scias ke, se kamarado Lanti decidis alie, ni eble uzus nun Idon.

Kiam mi legas la statutajn celojn de SAT, mi ne vidas en vicaro ke SAT disvastigas, aŭ instruas Esperanton, do kion ni faru dum kongreso de aliaj asocioj aŭ UK? Ni povas propagandi pri SAT kiu jam okazas dum 10 jaroj nun (eble pli, klerigu min). Sed ĉu SAT povas havi en plena trankvilo kaj sen intervenoj de pasantoj kaj hazardaj vizitantoj, bonan jarkunsidon? Mi estas 100% konvinkita ke NE!

Dum dekoj da jaroj mi estis aktivulo en sindikato kaj spertis kiel dum ĝenerala kunsido 'malamikoj' de la sindikato povis detrui la tutan kunsidon. Ni evitu tion dum nia jarkunsido.

'Ni fosu nian propran sulkon', diris Lanti kaj li pravis. Kiam mi legas Lanti, mi ĉiam miras pri la kvalitoj kiujn ĉi tiu kamarado havis.
Ni fosu nian propran sulkon, kio estas - interalie - klopodi unuigi esperantistajn laboristojn en unu granda asocio SAT.
Malplaĉas al mi la vorto klasbatalo, ĉar neniu povas decidi pri meti min en iu klaso, sed mi konvencie uzas la vorton por indiki la laboristan lukton, la batalon kontraŭ ekspluatado kaj subpremado.

Ek de tempo kiam Karl Marx verkis 'Komunista manifesto' ĝis nun la sorto de la laboristoj en precipe okcidenta mondo multe pliboniĝis.
En tempo de Karl Marx, infanoj de 9 jaroj jam laboris en fabriko, en teruraj cirkonstancoj. Laboristoj devis labori 12 ĝis 14 horojn tage por salajro de 30 eŭrocentoj. Kiam ili pagis bazan nutraĵon kaj luadon de dometo ili jam ne plu havis 3 eŭrocentojn. La vivekspekto estis 45 jaroj. Feliĉe por kvarono de la monda loĝantaro ĉi tiuj teruraĵoj ne plu ekzistas.

Unu kvarono … momenton, ĉu tio signifas ke tri kvaronoj ne jam havas decan vivon? Homoj kiuj ŝatas gugli devas klopodi trovi freŝdatajn kalkulojn pri malriĉeco en la

mondo. Oni apenaŭ aŭ tute ne trovas ĝin.
Malriĉa signifas ke oni havas enspezon de malpli ol 2 dolaroj tage. Se vi havas nur 1 dolaron tage vi estas en ekstreme malriĉa situacio.
Ho jes, vortoj, indikiloj, normoj, grafikoj abundas, sed eble estas ŝoko por vi, kara leganto, la plejmulto de laboristoj en la mondo daŭre estas ekspluatata, subpremata.
Ne kiel en la 'riĉaj landoj' kie laboristoj devas kalkuli la monon kaj esperi ke ne estas pli da monato ol mono. Milionoj kaj milionoj da homoj en mondo eĉ ne povas kalkuli la monon kiun ili posedas, ĉar ili havas nenion.

Miloj kaj miloj da laboristoj eniris malliberejon, estis dum la historio de 'klasbatalo' mortpafitaj ĉar ili postulis pli decan vivon.
Estas unu de la taskoj de SAT, pere de la revuo Sennaciulo, informi la membrojn pri laboristaj luktoj, pri subpremado, pri minacoj kaj krimaĵoj de tiuj kiuj faras nenion pli ol postkuri gigantajn gajnojn.

Ni ĉiuj volas niajn varojn kiel eble plej malkostajn kaj samtempe postulas salajron plej altan. Ĉu ne estas iu kontraŭdiro en tio?
Ĉu ne estas la tasko, la devo de ĉiu laboristo alstrebi ke ĉiuj homoj en la mondo havu decan vivon, minimumon da komforto? Per tio mi komprenas ĉiutage sufiĉe da manĝo, ŝirmilon kiu estas sekura, puran akvon, kaj necesejon kiu evitas disvastigon de epidemioj.

Kvarono de la laboristoj en la mondo havas pli bonan vivon ol kiam Marx verkis siajn tezojn, tri kvaronoj vivas en malriĉa aŭ ekstreme malriĉa situacio.

Kamarado el SAT volas havi referendumon pri komuna kongreso - SAT kaj Universala Kongreso de Esperanto.



Ĉu vere ni perdu nian valoran tempon al ĉi tiu afero aŭ ĉu ni koncentriĝu al tio kio gravas por la laboristaro.

SAT estas kleriga asocio, plene kaj tute sendependa de iuj aliaj asocioj, de politikaj partioj, de politikaj demagogoj.
Ni havas du informilojn, kiujn ni uzas, la interreton, la ttt-paĝaron de SAT en kiu aperas la aktualaj temoj, la aktualaj luktoj kaj Sennaciulon en kiu ni povas enprofundiĝi pri la temoj kiuj tuŝas la mondan lukton de la laboristaro.
Ni koncentriĝu al nia tasko, ni interŝanĝu ideojn kaj tezojn, ni diskutu kaj ni informiĝu kaj estu informitaj.

Estas persona opinio kaj mi certe ne parolas kiel reprezentanto de la Plenum-Komitato de SAT.
SAT havas sian specifan taskon, SAT fosas sian sulkon. Ni havas nian jarkunsidon en sereneco kaj trankvilo, SAT-anoj inter SAT-anoj.
Ni klopodu aranĝi tiel, ke kiel eble plej multaj membroj de SAT kaj simpatianoj de SAT povu partopreni la kongreson de SAT dum kiu okazas la jarkunsido.

Ni ne devigu (?) niajn membrojn partopreni UK kiu kostas (nur aliĝkostoj) 6-oble pli ol SAT kongreso. Ĉi tiu ne estas kritiko kontraŭ la prezo de UK. Ĉi tiu estas defendi la eblojn al laboristoj kun pli modesta enspezo partopreni jarkunsidon de la propra asocio.

Ni fosas nian propran sulkon. Mi esperas ke ĉiuj anoj de SAT konsentas pri tio.

SAT

**La jarkunsido de SAT okazos ĉi-jare dum SAT-kongreso en Braŝovo, 1an de aŭgusto ĝis 6an de aŭgusto 2010. Uzu viajn demokratajn rajtojn; partoprenu - kundecidu!**

# Leteroj kaj opinioj de legantoj



## Estimata redaktoro -

Mi ne certas ĉu pli mi amuziĝis aŭ ŝokiĝis pro la letero de Vladimir Ĵelev en Sennaciulo 3-4 2010, responda al tiu de Vladimir Baboski en antaŭa numero. Vladimir Ĵ kaj Vladimir B loĝas ambaŭ en la urbo Prilep en Makedonio, sed Ĵ opinias ke B ne sufiĉe agnoskas la bulgarajn historion kaj karakteron de ilia hejmurbo.

Nu ĉu la 'S' en SAT reprezentas 'sennacieca' aŭ 'sianacieca' ? Kion dirus la kreintoj de nia asocio se ili legus tiun leteron - de matrikulita SATano ? Iu ajn kiu minimume studis la historion (per sennaciecaj okulvitroj) scias ke ĉiuj landlimoj estas arbitraj, ke ĉiuj 'nacioj' estas miksaĵoj de variaj gentoj kaj ke ĉiuj 'naciaj' lingvoj estas arbitre fiksitaj de potenciuloj pro propraj politikaj celoj.

Jes ja, ekzistas riĉa kultura historio rilata al la nomo 'bulgara'; same al la teritorio 'Makedonio'. Sed ambaŭ, diable, estas nur partoj - arbitraj partoj - de plivastaj slavaj kaj balkanaj kulturoj. Kaj la slavoj ne estas ia aparta specio, sed nur branĉo, branĉaro eĉ, de la homa familio. [okazas ankaŭ en familioj bataloj kaj konfliktoj, ĉu ne?] Lastatempaj esploroj pri DNA konfirmas ke ĉiuj homoj estas genetike preskaŭ tute samaj, ke la diferenco inter japano kaj afrikano estas minimuma ….. sen paroli pri (orient) makedonoj kaj (okcident) bulgaroj !

Jam dum multaj jaroj mi ŝokiĝas pro kiom da kvazaŭ-naciismo evidentas inter esperantanoj, eĉ inter sennaciistoj. Ĉu ni ne povas definitive konstati ke la t.n. 'nacioj' estas artefaritaj kreaĵoj de la burĝaro pro ties politikaj celoj, post la disfalo de feŭdismo kaj monarkismo? La enloĝantoj de Prilep celebru kiom ili heredas el fontoj makedonaj, bulgaraj, balkanaj, slavaj, turkiaj, helenaj, eŭropaj ….. homaraj ! La diferenco inter la bulgara kaj makedonia kulturoj estas bagatela kompare al ilia komuna heredaĵo.

For la naciismo !

***David Kelso (ĉu gravas la lando?)***

## Etikaj bankoj

Laŭ mia rigardo, banko estas etika maljam kiam ĝi funkcias sen rentumo(=interezo) kaj sen dividendo. Plej proksima al tio verŝajne estas la bankoj J.A.K., kiuj ekzistas en Svedio kaj Danio. Estas planataj similaj bankoj en Italio kaj Nederlando (ASN-rentevrij, kunlabore kun asocio “strohalm”)

***Ronaldo Nobel’ 34318***

## Respondeco pri informado

Informi aŭ ne povas veki tiklan problemon. Mikaelo Simis (Sennaciulo decembro 2009 p23) atentigas nin ke "Ruĝa Kruco" silentigis informojn por resti neŭtrala sed, eble, tiu neŭtraleco permesis al la organizaĵo ne esti forĵetita de nedemokrata regno. Tiel kelkaj homoj vidis nepublikigitajn eventojn. Ĉiu homo respondecante pri sia konduto povas paroli en sia nomo sen mencii sian organizaĵon, sed informiloj bone ŝirmiĝas malantaŭ dika muro kaj unuopulo ofte vane sin batas kontraŭ ĝi. Memoru la katastrofon de Ĉernobilo. En "libera mondo", informilaro diris ke soveta diktaturo sufokis la informojn, do ke ĝi nenion sciis pri la evento dum la unuaj du semajnoj. Poste ĝi asertis, ke radiantan nubon doganistoj haltigis. Neniam ĝi parolis pri satelitoj observantaj la grundon kaj povantaj vidigi veturilojn kaj eĉ ties numerojn. Do flamojn kaj fumon de la brulanta nuklea centralo iuj bone vidis, tio ekster soveta regno. Vidis kaj silentis ne pro neŭtraleco.
Mi bone komprenas, la novaj feŭdistoj, bankoj, armilkomercistoj (k.t.p.) mutigas informilojn, disdonas mensogojn malice vestatajn per "virta vero" kaj sekrete helpas diktaturan regnon kiu submetas popolon.
Mi revas pri sennacia organizaĵo komisiata al informaro, kiu povus sendi enketistojn pri iuj ajn eventoj kien tio ŝajnus utila, trapasante ĉiujn landlimojn. Kiam doganistoj kaj policistoj volus vidi tute nudajn civitanojn montrantajn ke ili nenion kaŝas, kial regno povus konservi sekretan spacon? Ĉu ĝi kaŝas interesojn kontraŭajn al tiuj de civitanoj?

*Michel Marko 35661*

SAT



# Informo pri SAT-Kongreso en Braŝovo

La prezidantino de OKK de SAT-Kongreso en Braŝovo sendis al ni sekvan informon kiu certe utilas. Por vojaĝi aviadile el tuta Eŭropo al Bukareŝto, oni povas uzi malmultekostajn flugagentejojn "Wizz Air" kaj "Blue Air". La prezoj dependas de la elektita tago aŭ flugo. Povas uzi Wizz Air tien kaj Blue Air reen aŭ inverse, se la proponitaj flugoj aŭ prezoj ne estas konvenaj.

La prezo de ekzemple Brussels flugkompanio estas € 225, mi kontraŭ € 109 povas atingi Bukareŝton pere de Wizzair. Por rezervi biletojn, konsultu: www.wizzair.com aŭ www.blueairweb.com

La celo de ĉi tiu informo absolute ne celas propagandi la flugkompaniojn sed havas kiel celon informi vin, ke por ne tro alta sumo oni povas atingi Braŝovon.



## Rezolucio

**La 9a Konfederacia Kongreso de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro en Katalunio,**
Atentinte la urĝan bezonon de plena internacia kooperado de la liberecanoj en la kunagado kontraŭ la kapitalismo,
Atentinte ke tiu kooperado nepre estu regata de la procedoj de la rekta demokratio kaj ke tiu ĉi eblos nur per la uzo de komuna internacia lingvo,
Atentinte ke ne eblas, ke tiu ĉi komuna lingvo estos iu nacia lingvo, unue kaŭze de la malfacilaĵoj por la plejmulto el la laboristoj lerni naturan lingvon, due kaŭze de la kompara ofendo, kiu estus la fakto, ke parto el la movado uzus kiel komunan lingvon sian propran denaskan lingvon kaj alia parto lingvon nur duonlernitan, kaj fine kaŭze de la ideologiaj problemoj generotaj de la ebla uzo, kiel tian komunan lingvon, de iu el la nun hegemoniaj koloniismaj lingvoj,
**Decidas**
Deklari la Internacian Lingvon Esperanto kiel la nuntempe plej taŭgan por la starigado de horizontalaj kaj egalecaj rilatoj inter la laboristoj de la tuta mondo kaj inter la liberecanaj organizoj.
Kuraĝigi ĉiujn organojn de la ĜKL/CGT por ke ili stimuligu la disvastiĝon kaj lernadon de la Internacia Lingvo inter siaj gealiĝintoj kaj amikoj.
Proponi al ĉiuj liberecanaj organizoj la stimuligon de la esperantolernado, cele al ebligi la uzadon de esperanto kiel laboran lingvon en la kunordigado de la internacia liberecana movado.

Lleida, la 7an de februaro de la 2010-a

SAT

## Himno al Semo

Stultaj poetoj, vi la floreton, ho, ne priploru !
Ne, ĝi ne mortas, nur la petaloj falas surteren,
kaj dum somero kreskas mistero en dolĉa sino,
jen, en la frukto kaŝas futuron ĝi en la grajno.

Pri tritikkampoj, portantaj grajnojn sonoru kanto,
sonoru kanto per grajnoj ĉe flava helianto,
kaj kiam falas glanoj de kverko, kaj la kaŝtanoj,
grajnoj kaj fruktoj kaj terproduktoj, al vi omaĝo !

Pomoj, persikoj, morusoj, framboj, migdaloj, traŭboj,
fruktoj de ruĝaj rozberoj, bluaj nigraj pruneloj
gardas la semojn dum frosta vintro por la estonto,
kiam printempe pro la sunbrilo ŝaŭmas la Vivo !

En la infero gaje donas vivsignon la tero,
kaj herediĝas en ĝi ni mem ĝis fino de l' mondo.

Gardu la mondon kontraŭ nuklea, murda eksplodo,
ke ne estingu nian futuron "atomfantomo" !

***Ferenc Jáki16. 11. 1919—26. 03. 2010***
***Kantante Vivi : Poemoj kaj Art-tradukoj- Szolnok 2006***

recenzo D. Janiĉiĉ

# Aventuroj de okjarulo

Ĝura Majstoroviĉ, esperantisto, pedagogo kaj patro de niaj plej junaj esperantistoj verkis antaŭ dekdu jaroj – libron pri sia ekskurso tra Ŝumadio kune kun sia okjara filo Umbaja. Tereza Kapista esperantigis la libron, lingve kontrolis Vinko Markovo el Parizo. Tiamaniere antaŭ ni aperis unu speca konfeso de la okjara Umbaja kiu somere, antaŭ dekdu jaroj faris aventuron validan de atento, faris belegan promenadon tra Ŝumadio. Ŝumadio estas centra parto de Serbio, la plej bela, verda parto de lia patrujo.

Enhavo de libro estas neordinara rakonto pri ordinaraj aferoj. Aventuro iri piede nun, en tempo de aŭtomobiloj, aŭtobusoj, trajnoj, bicikloj... Ekkoni naskiĝlandon per gamboj, kune kun patro pro sekureco. Ĉi tiu libro estas rakonto pri renkontiĝoj kun nekonataj homoj, rakonto pri harmonio kun naturo, pri gastemaj vilaĝanoj de Ŝumadio, pri dormado sub somera ĉielo, pri kolektado de fruktoj, pri preparo de tagmanĝo, pri edukado, pri gepatra amo... Finfine, kiel vera dolĉaĵo – fantasta laŭdo de heroeco de Umbaja, kiu komencis ekkoni sian patrolandon kaj deziris travivi aventuron.

> **Enhavo de libro estas neordinara rakonto pri ordinaraj aferoj. Aventuro iri piede nun, en tempo de aŭtomobiloj, aŭtobusoj, trajnoj, bicikloj... Ekkoni naskiĝlandon per gamboj, kune kun patro pro sekureco.**

Umbaja nuntempe estas studento de muzika konservatorio en Parizo. Li komencis studadi en Parizo danke al esperantistoj. Nur estas aktiva esperantisto.
Kun rideto li pasintmonate parolis pri tagoj de sia granda aventuro, pri sia patro, organizanto de aventuro kaj fotisto de lia vojaĝo. Li estas kreskulo, vidis pli sufiĉe de granda mondo, konkeris multajn internaciajn premiojn por muziko – rapide li finos studadon... Tamen, li rememoras sian infanan aventuron kiel la plej belan travivaĵon el sia vivo.

Libro, ĝiamaniere, havas apartan historion. Ĝi estis verkita tuj post reveno de la kvintaga ekskurso, sed ne estis eldonisto, ĉar libro enhavas multajn kolorajn fotojn kaj elspezoj de presado estis multekostaj. Fine de pasintjaro FES "Branko Maksimoviĉ" decidis presi modestan eldonkvanton, ĉar familianoj Majstorović estas ĝiaj membroj. Modesta libro, tutkolora, nur 86 paĝoj, sed libro estas vera refreŝigado. Frukto de unu edukada koncepto, stimulo por ŝatantoj de naturo, libro sen grandaj pretendoj, verkita simple, vere, dokumente, kiel ilustrita taglibro.

Fine de la libro estis poemo. Kantema, ekologema poemo pri naturo. Umbaja diris ke li intencas komponi muzikon pri tiu teksto kiu bele esperantigis forpasinta Marko Petroviĉ. Poste lia familia muzika grupo faros KD kaj ĉiuj esperantistoj povas aŭskulti kaj kanti ĝin. Libro estas bele preparita, ĝia enhavo estas simpla, sed tre legebla, ĝiaj mesaĝoj aktualaj, sendube bela libro, sen konsidere ke ĝi parolas pri Ŝumadio, ĝia enhavo trairas limojn de regiono, ĝiaj mesaĝoj estas universalaj por gepatroj, por ekologistoj, pedagogoj, por infanoj, ĉar, eble, ĝi unue estas infana libro. (D. Janiĉiĉ)

(Ĝuro Majstoroviĉ: Umbaja nes – piede tra Ŝumadio, eldonis Fervojista Esperanto Societo „Branko Maksimoviĉ", Beogrado, 2009, 86 paĝoj, ISBN 978-86-913381-0-7)

SAT

# Raporto de la Plenum-Komitato por la periodo de junio 2009 ĝis majo 2010

Kiel pasintjare, ĉi tiu raporto estas sufiĉe ampleksa rilate raportindaĵojn. La prezo de tiu precizemo estas, ke eble estas mankoj kaj eraroj. Kamaradoj, kiuj konstatus ilin estas kore invititaj skribe antaŭredakti amendojn, kiujn eblos pridiskuti dum la SAT-Kongreso.

## Plenum-Komitato

Eĉ pli ol pasintjare la Plenum-Komitato kunvenis rete kaj malpli ofte fizike, pro geografia diseco ĝiaj membroj. El organiza vidpunkto ne okazis grava ŝanĝo en la taskodispartigo.

## Raporto de KonfliktKomisiono 2009-2010

Konsistas el k-doj Vincento Ĉarloto (Charlot), Petro Levi' (Lévy) k Vito Markovo.
Sekretarias Vito Markovo.
La KK ĝojas esti prizorginta neniun priraportindan konflikton dum ĉi periodo!

## Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2009-2010

La konsisto de ĜK-aro nun tias:
Reprezentantoj de lokaj rondoj: k-doj Renata' Ĉasardo-Kaŭbelo (Chassard-Caubel; Aĝenio [Agenais]), Gbeglo Kofio (Koffi; Togolando) kaj Andreo Vejso (Weiss; Pireneoj), Jamasaki' Seiko (Kokubunĝio [Kokubunzi]).
Reprezentanto de sideja urbo: k-do Vincento Ĉarloto
Konfliktkomisiono: Vincento Ĉarloto, Petro Levio k Vito Markovo
LEA-reprezentantoj: k-doj Karlo Burlot' (Bourlot; iLEA, itallingva), Nikolao Gudskovo (PREM, ruslingva), Tani' Hirojukio (Hiroyuki; SATeJ, japanlingva), Kani' (SATeH, hispanlingva), Ron' Linno (Lynn; SATEB, anglalingva), Gari' Miklo (Mickle; LEA/G, germanlingva), Paz' (SATeK, korelingva), Pello Persono (Persson; SLEA, svedlingva), Serĝo Sir' (SAT-Amikaro, franclingva).

ĜK-aro konstatas, ke PK regule kunvenas kaj akurate sendas siajn laborojn al ĜK-aro. Reage, la ĜK-aro komentas, konsilas, sugestas al la PK.

***Raportis pri KK k ĜK-aro la sekretario: Vito Markovo***

## Administrado

La taskoj dispartiĝas kiel detale klarigite en la januara Sennaciulo (p39-40). Plej emfazinde estas, ke la laborŝarĝo de pluraj prizorgantoj estas tre alta, kaj ke pliaj helpantoj estus tre bonvenaj. La daŭra helpo de eks-PK-anoj JoBo kaj Kreŝo Barkoviĉ plurfoje montriĝis tre utila.

## Adresaro

La ĝisdatigo kaj purigo de la membrosliparo multe progresis dum la jaro. Nova papera adresaro, multe pli ĝusta ol tiu de 2008, devus esti eldonita en aŭtuno 2010. La preparlaboroj estas iom pli longaj ol antaŭvidite pro klopodo aŭtomatigi la sistemon, sed kompence devus esti pli facile produkti ĝin dum venontaj jaroj.

## Kasraporto

Ĝi aperos en la venonta numero.

## Rilatoj kun LEA-oj kaj SAT-rondoj

LEA-oj ligitaj al SAT per la Gotenburga konvencio plu funkcias en Franclingvio (SAT-Amikaro, 685 membroj), Hispanlingvio (SATeH, 25 membroj), Anglalingvio (SATEB, 50 membroj), Svedio (SLEA, 50 membroj), Italio (ILEA) kaj Japanio (SATeJ). Krome k-doj varbas por SAT kadre de Arci-Esperanto en Italio, kaj en diversaj neformalaj rondoj en Germanio (LEA/G), Nederlandlingvio (Progresema Esperanto-Forumo) kaj Koreio (SATeK). Aparte menciinda estas la eldono, flanke de SATeH, de hispanlingva versio de la libro "Laboristaj Kronikoj" de k-do A. Marco Botella.
En junio 2009 oficiale malfondiĝis ASLE, iama LEAo en Aŭstrio, kiu delonge vegetis.

## Dissendolistoj de SAT

Plu funkcias, kiel ĉefaj dissendolistoj la Iper-rondo de SAT, malfermita al ne-SAT-anoj (71 anoj), kaj SAT-diskuto (141 membroj), rezervita al SAT-anoj.

## Landaj perantoj

SAT nun havas 33 perantojn, kaj 24 senperantajn landojn kiujn prizorgas gek-doj Weiss. En kelkaj kazoj la kontakto malfortiĝis lastatempe, kaj devas esti restarigita.

## Sennaciulo - Sennacieca Revuo

Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo estas daŭre la solaj oficialaj informiloj de SAT pro fakto ke per ili kaj nur per ili ni povas atingi ĉiujn niajn membrojn. Jam plurajn jarojn Sennaciulo aperas nur ĉiun duan monaton kaj tio

***daŭrigo raporto post ero membraro***

## Membraro

Je la 22a de aprilo la membraro de SAT konsistas el 765 membroj, el kiuj 215 jam repagis sian kotizon por 2010, 489 pagis ĝin por 2009, kaj 276 uzas la solidarservon. La ĉi-kuna tabelo eblas havi pli precizan komprenon pri la strukturo de la membraro.

| Lando | Pagintoj | Solidarservo | Sumo |
|---|---|---|---|
| Argentinio | 3 | 5 | 8 |
| Aŭstralio | 7 | 1 | 8 |
| Aŭstrio | 1 | 1 | 2 |
| Barato | 1 | 0 | 1 |
| Belgio | 5 | 12 | 17 |
| Bosnio-Herzegovino | 8 | 0 | 8 |
| Brazilo | 1 | 24 | 25 |
| Britio | 17 | 7 | 24 |
| Bulgario | 6 | 16 | 22 |
| Ĉeĥio | 8 | 1 | 9 |
| Ĉinio | 0 | 3 | 3 |
| Danio | 3 | 0 | 3 |
| Estonio | 0 | 1 | 1 |
| Finnlando | 2 | 0 | 2 |
| Francio | 151 | 39 | 190 |
| Ganao | 0 | 1 | 1 |
| Germanio | 14 | 26 | 40 |
| Grekio | 1 | 0 | 1 |
| Haitio | 0 | 1 | 1 |
| Hispanio | 22 | 9 | 31 |
| Hungario | 5 | 3 | 8 |
| Islando | 2 | 0 | 2 |
| Israelo | 4 | 1 | 5 |
| Italio | 16 | 1 | 17 |
| Japanio | 77 | 9 | 86 |
| Kanado | 2 | 1 | 3 |
| Kongo, DR | 0 | 1 | 1 |
| Kongo, PR | 0 | 1 | 1 |
| Koreio | 15 | 2 | 17 |
| Kroatio | 1 | 13 | 14 |
| Kubo | 1 | 0 | 0 |
| Latvio | 0 | 2 | 2 |
| Litovio | 0 | 13 | 13 |
| Luksemburgio | 1 | 0 | 1 |
| Malagasio | 12 | 0 | 12 |
| Makedonio | 1 | 0 | 1 |
| Malio | 1 | 0 | 1 |
| Meksikio | 0 | 1 | 1 |
| Mongolio | 1 | 0 | 1 |
| Nederlando | 22 | 8 | 30 |
| Nigerio | 0 | 1 | 1 |
| Norvegio | 4 | 1 | 5 |
| Pollando | 0 | 8 | 8 |
| Portugalio | 6 | 0 | 0 |
| Reunio (Francio) | 0 | 1 | 1 |
| Rumanio | 0 | 3 | 3 |
| Rusio | 5 | 10 | 15 |
| Salvadoro | 0 | 1 | 1 |
| Serbio | 28 | 20 | 48 |
| Slovenio | 1 | 0 | 0 |
| Slovakio | 0 | 2 | 2 |
| Svedio | 13 | 12 | 25 |
| Svisio | 7 | 0 | 0 |
| Tajvano | 2 | 0 | 2 |
| Tanzanio | 0 | 1 | 1 |
| Togolando | 0 | 6 | 6 |
| Ukrainio | 5 | 3 | 8 |
| Usono | 7 | 3 | 10 |
| Vietnamio | 0 | 1 | 1 |
| Sume (57 landoj) | 489 | 276 | 765 |

Necesas noti, ke en kelkaj landoj la nombro de solidarservuloj estas troigita pro momenta superŝutiteco de la peranto, aŭ pro manko de kompletaj informoj.
Dum la jaro mortis 15 kamaradoj kaj aliĝis 24 novuloj (de 35902 ĝis 35925).

post decido de la SAT kongreso en Beogrado.
Tamen, la kvanto da paĝoj kiujn la membroj ricevas plialtiĝis (antaŭe, estis 16 paĝoj monate, nun meznombre 18 paĝoj monate).
La laboro okazas fare de volontuloj. Redaktoskipo konsistante el 10 personoj (15-an de aprilo 2010) klopodas trovi verkantemulojn, kiuj volas kontribui al niaj revuoj. La skipanoj ankaŭ kaj precipe zorgas pri korektado de la tekstoj kiuj aperas en Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo.
La skipo strebas atingi kiel eble plej altan nivelon rilate informadon, kulturon kaj sciencon. Ankaŭ la aspekto de la revuo estas prizorgata por atingi kiel eble plej profesian nivelon.
Gravas por diri, ke la redaktoskipo strebas kiel eble plej malmulte redakti tekstojn kaj se tamen nepras, la verkanto ĉiam scias kiujn ŝanĝojn/redaktadojn okazas antaŭ aperigo de la teksto. Kiam la statuto de SAT estas respektata, ne ekzistas ajna cenzuro kiu limigas liberecon de esprimo, nek en Sennaciulo, nek en Sennacieca Revuo.
Neniam en neniu kazo aperigas tekstojn kun rasisma tendenco aŭ kiuj atakas personojn aŭ asociojn.
Malgraŭ la fakto ke ofte la verkantoj estas aliaj personoj, la redaktoskipo klopodas prezenti unuformecon en prezento de la malsamaj tekstoj.
Konstrua kritiko ĉiam estas bonvena kaj oni sendu ĝin prefere al <sennaciulo@telenet.be>.
15-an de aprilo 2010

***Por Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo la respondeculo de la revuoj***
***Jakvo Schram***

## Gazet-administraĵoj kaj represoj

Sennaciulo havas nur 9 abonantojn, kiuj pagis por 2010. Ankoraŭ atendata estas repago de 5 abonintoj por 2009 kaj 4 por antaŭaj jaroj. Krome Sennaciulo estas sendita interŝanĝe aŭ varbocele al 54 gazetoj aŭ asocioj. Artikoloj el Sennaciulo aperis tradukite hungarlingve kaj franclingve.

Stagnadis ĉijare la disdonado de la kromekzempleroj, kaj la gvidrezolucia peto pri starigo de tradukreto por instigi al pli sistema tradukado de artikoloj ankoraŭ ne estas starigita. Malmultaj ekzempleroj revenas al la sidejo, sed tamen venas tra aliaj kanaloj informoj pri neregula alveno de la gazeto ĉe iuj kamaradoj, supozeble pro la mondskala malboniĝo de la kvalito de la poŝtaj servoj. Laŭeble ekzempleroj estas resenditaj al kamaradoj, kiuj akurate repagis siajn kotizojn, kiam venas informo pri la perdiĝo.

## Elektronika PIV

Meze de aprilo estis subskribita kontrakto kun E@I por prizorgi la starigon de reta versio de PIV, kiu estos senpage alirebla en la reto, sed kun alvokoj al mondonacoj por subteno de la projekto. SAT konservos ĉiujn rajtojn pri la enhavo de PIV kaj plu zorgos pri ĝia ĝisdatigo, sub respondeco de Michel Duc Goninaz kaj Klaŭdo Roux.

## Retejo

La retejo de SAT enhavas 948 artikolojn je la 22a de aprilo, kaj ricevas meze 399 vizitojn tage. Malgraŭ signifa kresko de la vizitantonombro (estis 250 en 2009, kaj 150 en 2008), grava problemo restas la tro malgranda nombro de partoprenantoj en la ĝisdatigo de la retejo, kiu kaŭzas malfruon en aperigo de gravaj informoj kaj ne ebligas plene ekspluati la produktitan enretigeblan materialon, kiu grandkvante kuŝas en duonpreta formo en la privata spaco de la paĝaro.

## Eldona fako kooperativa

Por la Milana kongreso la kooperativo eldonis 150-ekzemplere du pliajn librojn: Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso kaj Plano B, kaj komence de 2010 diversajn glumarkojn, pinglojn kaj T-ĉemizojn. Krome, ambaŭ libroj eldonitaj 150-ekzemplere en 2008 (pri Gramsci kaj pri la Pariza Komunumo) jam elĉerpiĝis, kaj korektitaj versioj estas en preparo. Multaj aliaj projektoj estas envojigitaj laŭ diversnivela pretecostato, kaj plia grava projekto, pri kiu aperos aparte detala informo, estas la dokument-filmo pri Esperanto, financita per grava monprunto de SAT-Amikaro.
El praktika vidpunkto, la kooperativo nun funkcias ĉefe tra la reta diskutgrupo "SAT-EFK", kies adreso estas http://fr.groups.yahoo.com/group/SAT-EFK/.
En ĝi membras 30 kamaradoj, kiuj konsistigas la eldon-komitaton, funkcianta laŭ reguloj plu precize difinendaj.
Plej urĝe solvenda problemo estas la ankoraŭ nesufiĉe bone strukturita disvendo-reto, kiu ebligas kontentigan vendon de modest-kvante eldonitaj libroj, sed montriĝas limiga por pli ambiciaj projektoj. La ekigo de la filmoprojekto, por kiu ni planas vendi mondskale 4000 DVD-ojn, devigos nin rapide organiziĝi por plibonigi ĉi tiun flankon de nia agado dum la venonta jaro.

## Poresperanta fako

En aprilo 2010 membris en la PF 31 kamaradoj, el kiuj nur kelkaj aktive partoprenis la laboron de la Fako. Dum la SAT-kongreso 2009 en Milano la PF

kunvenis dufoje, unuafoje en ĝenerala kunveno kaj duafoje por prilabori la pri-SAT-an Esperantlingvan informilon. Kadre de la PF plurfoje okazis interŝanĝoj pri specifaj informiloj kaj informcelaj tekstoj, interalie pri la kongresa artikolo, kiu tradukiĝis kaj rete aperis en 5 lingvoj, kaj pri la informilo pri SAT, kies prilaboro okazadas, sed kun malfruiĝo.

***Gary Mickle***

### Muzika "fako"

Kvankam muzika fako ne havas formalan ekziston en SAT, pluraj kamaradoj aktive kaj regule partoprenas en diversaj kulturaj projektoj, kie muziko ludas ĉefan rolon.
Ĉefa projekto, pri kiu estis jam detale raportite en Sennaciulo, estis la surscenigo, sub gvido de k-dino Lévêque, de la "Ĝenerala Kanto" de Pablo Neruda kaj Mikis Teodorakis, kun kvindeko da gekantistoj kaj muzikistoj el diversaj francaj regionoj. Jam okazis du koncertoj (en Bureso kaj Hiliono) kaj tri aliaj estas planitaj (Kaiserslaŭterno, Manso, Havano).
Pluraj koncertoj, organizitaj kunlabore kun fakaj grupoj de ARCI, okazis dum la pasinta SAT-kongreso en Milano. Interalie ludis la muzikkgrupo "Rêverie", kun kiu daŭre kunlaboras k-do Fontana.
Daŭre okazas tutsemajna muzikstaĝo en la kulturcentro Kvinpetalo dum la somero, sub la gvido de ge-kdoj Markovo, kiu ebligas interalie riĉigi kaj diskonigi la repertuaron de laboristaj kantoj.
K-do Kim J.Henriksen estis la ĉefrespondeculo pri muziko kaj programo de la Kultura Esperanto Festivalo okazinta en Helsingoro inter la 7a kaj la 12a de julio 2009. K-dino Lévêque organizis en oktobro "Muzikajn, Internaciajn, Renkontojn Esperantistajn por Gejunuloj Eŭropaj" inter la 24a kaj 31a de oktobro. Venonta eldono de ĉi tiu renkontiĝo okazos en Bulgario ĉi-somere.
Du esperantaj koncertoj okazis en la iama kooperativo kaj sidejo de SAT, "la Bellevilloise", en Parizo la 19an kaj 26an de septembro, kaj la Ketinia esperanto-grupo organizis koncerton apud Diĵono la 25an de aprilo 2010.

### Multlingva sindikata novaĵretejo LabourStart

Bedaurinde la laboro ĉe LabourStart suferis gravan problemon dum la pasintaj monatoj.
Mia fidela kunlaborantino Alwyn Kind mortis antaŭ kelkaj monatoj kaj nun mankas al ni fidela esperantisto kiu kapablas akurate traduki/resumi artikoletojn. Alwyn fidele tradukis minimume 3 artikoletojn ĉiusemajne dum jaroj (eble pli ol 10).
Mi mem ne volas aŭ eĉ ne kompetentas agi kiel redaktoro. Mi nur elektas la artikolojn el LabourStart kaj sendas ilin al la tradukisto. Ili devas rapide respondi kaj resendi tradukaĵojn akuratajn sen eraroj ktp.
LabourStart uzas diversajn lingvojn kaj la tradukisto povus mem elekti la artikolojn de LabourStart aŭ aliaj fontoj. La artikoloj devas esti pri sindikataj aferoj ne pri ĝeneralaj politikaj aferoj.
Pro kopirajtaj leĝoj ni ne rajtas traduki artikolojn rekte do vere la tradukaĵo devas esti resumado de artikoloj.
Bonvolu noti ke mi kelkfoje ricevis mesaĝojn de volontuloj sed mi trovis ke ofte ili vere ne kapablas senerare traduki.

***Paul Hewitt***

### Ĉielarka frakcio

En Junio 2009, japanaj anoj de la frakcio sendis solidaran mesaĝon kaj helpmonon al komitato de Ĉielarka Marŝo en Sapporo.

***NISHIKAWA Satoru***

### Pacista Frakcio

De la lasta Kongreso, la Pacista Frakcio ĉefe rigardis al la Konvencio de Oslo, kiu malpermesas iujn pafaĵoĵetojn el bomboj, por scii, kiam tiu Konvencio validiĝos. Ĝi validiĝos la 1-an de aŭgusto 2010. Tamen ĝi aplikiĝos nur en la tridek unuaj ratifintaj landoj. Inter tiuj landoj troviĝas precipe etaj landoj. La plejparto de grandaj landoj ne subskribis, nek ratifis la Konvencion de Oslo. Same ili ne subskribis, nek ratifis la Konvencion de Otavo, kiu malpermesas ĉiujn kontraŭpersonajn minojn. Tial la Pacista Frakcio proponos en la venonta Kongreso, ke tiu ĉi sendu leteron al la Ambasadoroj de Ĉinio, Finlando, Hindio, Israelo, Pakistano, Rusio kaj Usono en Rumanio por peti, ke tiuj landoj subskribu kaj ratifu tiujn du Konvenciojn.

***Marto 2010***
***Colette Weiss/André Weiss***

### Sennaciisma Frakcio

- Estis starigita dissendolisto de la Frakcio, kiu havas 12 membrojn. Ĝi ebligas interkonsiliĝon kaj decidotrovadon en la Frakcio, kies membroj en la granda plimulto estas retligitaj.
- La dissendolisto ĝenerala plu funkciis kiel en pasintaj jaroj kaj havas 81 membrojn.
- Kiel membromatrikulo funkcias la anaro de la frakcia dissendolisto (12 k-doj) plus la listo de eksterretaj membroj, kiuj

sin anoncis (aktuale 1 k-do).
- La utiligo de la Frakcia paĝo en S-ulo estas minimuma. Ni eluzis la principe disponatan spacon nur unufoje dum la pasinta jaro. Pri frakcia emblemo, utila interalie por la frakcia paĝo, oni ekdiskutis surbaze de proponoj de Serĝo Siro, sed ankoraŭ ne decidis.
- La reeldono de verkoj de Lanti kaj Kolĉinski progresas. Temas pri la Manifesto de la Sennaciistoj (Lanti) kaj ABC de sennaciismo (Kolĉinski). La verkoj pretas en diĝita formo por reeldono ĉe la Eldona Fako Kooperativa, ankaŭ antaŭparolo verkita de Geri Mikle.
- Eksteraj kontaktoj estis minimumaj. Vinko Markov restas en kontakto kun la Internacia Marksisma Tendenco, kies pensado relative proksimas al nia.

*Gary Mickle*

### Liberpensula Frakcio

Pro malfrua organizado la esperanta partopreno en la paska festeno de nekredantoj, tuj antaŭ la SAT-Amikara kongreso en San-Briego, estis multe pli diskreta ol pasintjare. Krome la departementa federacio de la Libera Penso en franca departemento Jonio (Yonne, 89) eldonas laikajn kalendarojn kun esperantaj skribaĵoj.

### Komunista Frakcio

Daŭre okazas tre sukcesa Esperanto-budo en la festo de la Homaro la duan semajnfinon de Septembro en Parizo, kiu ebligas konatigi esperanton al pluraj centmiloj da personoj. Krome okazis budeto okaze de departementa festo en Ortezo (Suda Francio) en junio 2009, kaj la multlingva komunista retejo "Marxist.com" de julio havas regule nutratan esperanto-rubrikon.

### Liberecana Frakcio

Ĉi-jare menciindas interalie:

- ĉiusemajnaj radio-elsendoj kadre de liberecana radio en Parizo (89.4 Mhz);
- apero de kelkaj artikoloj (pri Manuel Suarez kaj pri la kongreso en la gazeto de la hispana CNT);
- deklaro de hispana CGT pri esperanto kaj daŭra nutrado de la esperanta reta rubriko en "rojoynegro.info";
- kursoj en anarĥiismaj rondoj en Alikanto kaj Splito.

### Verdula Frakcio

AVE (verduloj Esperantistaj) formale kunlaboras kun SAT ekde 1999, malgraŭ la fakto ke Verda Politiko ne nur temas pri ekologio, nia loko ene de SAT estas la Ekologiisma Frakcio. Por ĝenerala informo mi kunmetas nian aktualan informilon, kie la kunlaboro kun SAT kaj UEA estas menciita. Enhave ni subtenis la agadon kontraŭ la pafaĵoĵetaj bomboj, kaj aparte per traduko de "100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio" - trovebla sur nia retejo - kie ankaŭ estas multaj dokumentoj kiamaniere kapital-interesoj damaĝas la naturon, sanon kaj bremsas la evoluon de laborlokoj sur la kampo de regajneblaj energioj. Prelego pri tio kaj pri "Videblaj kaj nevideblaj Plastajhoj en la akvaroj" diskutas simile la rilaton inter industriaj teknikoj, komforto kaj damaĝo de la sano de homoj kaj bestoj tutmonde. En Bulgario mi prelegos pri ambaŭ temoj. Mi mem verkis artikolon por S-ulo pri eŭtanazio en Germanio - nuntempa kaj dum la nazia epoko; kaj aktuale mi verkas por la temo GMO, kiu denove montras ke la kapital-interesoj de Monsanto k.a. ofte neglektas la vivajn. Nia "blogo" AVENO, rete ĉiusemajne, papere per jara kolekto, enhavas multajn temojn ofte ankaŭ verkitaj de aliaj AVE-anoj el la tuta mondo. Tamen, AVE ne simple kontraŭas la teknologian progreson, sed ni postulas pli amplekse antaŭvidi kaj esplori la riskojn kaj sekvojn de novaj teknologioj. Kompreneble AVE kunlaboras kun la Verdaj Partioj, kio ne signifas unu-kolorecon; pluraj AVE-anoj grupiĝas en ruĝ-verda frakcio ene de AVE.
Bedaŭrinde nia kontakto al N.I. Sekvojo reduktiĝis pro malfacila kunlaboro kun li al regula sendo de la ret-mesaĝoj kaj de la papera eldono. Ni ĝojas pri la tendenco en Usono abolicii la mortpunon kaj subtenas la organizaĵon NCADP.
Retmesaĝoj al: ave@verduloj.org - nia retejo: http://www.verduloj.org

*Manfred Westermayer*

### Venontaj kongresoj

Proponoj jam estas pristudataj por 2012 kaj 2013. Por 2011, plej verŝajne la kongreso okazos en Sarajevo. Tieaj kamaradoj antaŭvidas sendi vojaĝi al Braŝovo por prezenti la projekton.

### Perspektive

SAT daŭre vivas kaj tre aktivas, sed povos elteni la nunan agadoritmon nur se novaj kamaradoj iom post iom anonciĝos por helpi en diversaj taskoj.

**SAT daŭre vivas!**

# Homa ponto inter kulturoj



Permesu al mi aldoni personan noton ĉe la komenco de ĉi tiu artikolo pri mia plumamiko kaj konsilanto, la eminenta HU Guozhu. Neniam antaŭe en mia vivo mi konatiĝis tiel multe da sindonemaj homoj, dediĉinte sin al sennombraj horoj, tagoj, eĉ jaroj da laboro, kiel en miaj spertoj kun Esperantistoj. Mi miras kaj admiras. Guozhu estas bonega ekzemplo de tia persono. Do, mi rakontas al vi kelkajn elstarajn informojn pri lia diligenta personeco kaj pri kelkaj faroj kaj faraĵoj.

Redaktisto, poeto, tradukanto, prezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio HU Guozhu eklernis Esperanton en 1956. Guozhu estis tiel fervora lernanto ke li transskribis/kopiis mane kelkajn Esperantajn librojn kiujn li ne povis aĉeti tiutempe. Kompletajn librojn. Tutan volumon de *Esperanta antologio, Parnasan gvidlibron*, la poemaron *Izolo...* nu, pli ol dek klasikaĵojn.

Li komencis korespondi Esperante kun multaj fremdlingvanoj. Pro tio, la polico persekutis lin. Malgraŭ ke ili trovis nenion kontraŭleĝan en la korespondaĵoj, Guozhu ricevis punon pro la krimo "havi kontraŭleĝajn rilatojn kun fremdaj landoj". La puno estis forbalai rubaĵojn, en templimo de malpli ol 2 horoj, elsub 1012 teksmaŝinoj, en la tekstila fabriko kie li jam laboris.

Li iniciatis ĉineskon – versi laŭ ĉinaj fiksformaj poemoj - en Esperanton. Unu el la unuaj ĉineskaĵoj: *Petaloj | falas senbrue | en ĝarden'. Trans kurteno | pluvadas kontinue | kaj silke blue.* (Guozhu 1973-01-03) kaj li fiksis la fundamenton, verkante *Ŝlosilon de ĉinesko* en 2007. Hodiaŭ, poemoj versitaj laŭ la multaj skemoj de fiksforma poezio Ci-o, kiuj jam floras en Ĉinio dum eraoj, nun floras en la lingvo Esperanto, verkitaj kaj ĝuitaj de ĉinaj kaj neĉinaj poetoj kaj legantoj.

Danke al lia lernado de la antikva ĉina lingvo, Guozhu jam Esperantigis por ni: *Novelojn de Tang-dinastio, Strangaĵojn de Liaozhai* kaj aliajn juvelojn de antikva ĉina literaturo.
Li ĉinigis kaj verkis ĉinlingve: lernolibrojn, gvidlibrojn, Esperantajn poemojn, zamenhofaĵojn, kroatan fabelon... – li vere estas portisto inter kulturoj.

Al mia demando pri kiel kaj kial li komencis poezii, li respondis, ke ĉinaj infanoj komencis legi Tang-poemojn ekde infaneco; ofte komencante per la poemoj de Li Bai. Tiel la infanoj ŝatas (ĉinan antikvan) poezion. Li aldonis, *"Fakte ĉiuj homoj estas sentemaj, havas ĝojon/malĝojon, amon/malamon......Ordinare ne scias kiel esprimi sian senton poezie. Tamen, se ili legis poemojn, ili trovis ke la talentaj poetoj jam bonege esprimis tion antaŭ centoj aŭ miloj da jaroj. Vi povas prunti tiujn brilajn versojn. Se vi faris tion ofte, iom post iom vi povas esprimi vin per viaj propraj versoj."*

Kvankam mi scias ke Guozhu memlernis ne nur Esperanton sed ankaŭ antikvan ĉinan lingvon, kulturon kaj literaturon, mia miro pri tio igis min demandi al Guozhu kiel eblas ke li tradukas el la Tang-dinastio; ĉu la lingvo estas komprenebla? Ĉu ĉinaj tradukistoj uzas pli fruajn tradukaĵojn kaj modernigas la lingvon, en tipo de stafeto tra la jaroj?

*"Neniu scipovas traduki ekde la unua tago. Tamen post lernado kaj ekzercado vi povas progresi. Verkoj kaj versaĵoj de Tang-dinastio estas tre popularaj inter ĉinaj legantoj. Multaj materialoj helpas por kompreni la originalon. Restas nur unu problemo - ke vi devas havi la kapablon re-doni per Esperanto. Sen plena posedo de Esperanto vi ne povas traduki.*

*Fakte lingvaĵoj senĉese progresas. Tradukistoj tradukas ofte por legantoj de sia propra epoko, modernigante la lingvon. Tio okazas ankaŭ je nia Esperanto. D-ro Zamenhof tradukis ion, sed postaj tradukistoj faris pli novajn versiojn por la jam*

*tradukitaj de Zamenhof. Tio similas stafeton. Estas ne malofte vidate, ke por unu originalo ekzistas pluraj tradukoj. Povas esti ke ekzistas pli ol unu bonega traduko. Tio ankaŭ similas al pentri portreton. Ĉu oni malpermesas fari novan portreton de Kristo?"*

Ĉu vi partoprenis en kurso por tradukistoj? *"Mi lernis en lernejo nur ĝis 17-jaraĝo. Mi neniam lernis en universitato. Mi neniam lernis en kurso por tradukisto aŭ poeto. Mi persistas en dumviva memlernado. Post kiam mi posedis Esperanton per memlernado en plena izoliteco kaj nepagipoveco, mi kredas ke ĉio estas lernebla. Kie estas la volo, tie estas la vojo."*



Li Bai (701-762)
KANTO AL LA LUNO
—laŭ antikva ario

La lunon mi ne konis infanaĝe
kaj ĝin eĉ nomis blanka jad-telero;
aŭ prenis por spegulo de felando
fluganta inter nuboj en ĉielo.

Jen pendis du piedoj de la feo,
kaj pompe l' laŭro kreskis en prospero
La blanka lepor' jam elpistis drogon,
kiu do ĝin aprezos laŭ prefero?

La bufo rodis ek la rondan ombron,
igis la lunon kripla en vespero.
Iam naŭ sunojn Hoŭ Yi paffaligis
savante la homaron el danĝero.

Kio do nun ankoraŭ indas spekti
post malapero de l' lun' en etero?
Ĉu mi foriru, ve, en senhelpeco,
dolore turmentite de l' sufero!
Trad. Guozhu

NOKTA VETURO
— laŭ ĉinesko Yexingchuan (Nokta Ŝipveturo)

Ventas. Nokta tenero.
Soleca
ŝip' kun velo.
Dum lunlumo
fluas onde
en granda rivero.

Super la vasta tero
pendas mil
brilaj steloj.
Mi similas
al mev' inter
tero kaj ĉielo.
De Guozhu, inspirita de Du Fu, poeto kiu vivis inter 712-770

SAT

# Tsunagu-kabe – Kunliga muro
# Pri Keiko Miyamori


"Urba Arbo" ekspozicita en Filadelfio, Pensilvanio, Usono. El rezino, radiko, brikoj, metalaĵoj, vitro-pecoj

Keiko Miyamori estas japana artisto, kiu loĝas nuntempe en Usono. Ŝi kreas objektojn, kiuj prezentas kunligon kaj konekton inter naturo kaj homo; inter homo kaj homo. Oni vidas organikajn integriĝojn en ĉiu ŝia artaĵo. Frotkopioj de arboŝeloj kovras homfaritajn objektojn.

Al Keiko arboj ankaŭ konektas. Ili konektas kaj unuigas spacojn kaj donas energion. Eĉ nevideblaj radikoj -- kiujn ni ne povas vidi -- havas kutime la saman mason, kiel la videbla parto, eĉ tiu neobservita parto kontribuas al nia energio-tuto.

Ĉi tiuj vivkoncepto kaj vidpunkto pri la konekto inter homoj kaj naturo kreskis en Keiko multe pli post la vizito en Ĉinio, kie ŝi vidis memortenejon de Divizio 731 (731-Butai), la programo pri biologia kaj kemia eksperimentado per homoj farita de japana armeo dum la milito. Ŝi ne konis tiun parton de la japana historio, kaj la enrigardo en la malluman flankon de la homa ekzisto profunde ŝokis ŝin. Kiam Keiko revenis de la vizito, ŝi jam ne volis pentri agrablajn temojn.

Pri tiu vizito kaj pri sia posta, arta kunlaboremo kun aliaj, ŝi diras: *"Estis la momento, kiam mi ricevis tre gravan senton, kvankam mi ne komprenis la senton tiam. Mi kredas, ke estis tipo de energio de pardono. Mi kredas, ke mi estas parto de la unuiĝo. Se aliaj sentus same, tiam batali unu kontraŭ la alia sur la sama planedo ne havas sencon. Estas ja vere, ke malbono kaj bono ekzistas en unueco, kvankam mia espero estas, ke ĉi tiu loko devus esti konektita al pozitiva energio, kiu estas amo."*


Ŝi frotas per karbkrajono al sur vaŝia-papero (Washi) ĝis ŝi atingas klaran kopion de la arboŝelo.

*"Laŭ mi, mi ne estas gravulo; malgraŭe, mi kreas artaĵojn esperante komuniki kun aliaj sur pli profunda nivelo, uzante arton. Mi opinias, ke mi ne artumas nur por krei artaĵojn, arto vivigas min. Ne gravas, ĉu mi ne estas gravulo; mi volas lerni, kiel esti parto de io granda, kaj foje mi povas esprimi tion per arto - mi sentas, ke mi ne kreas; mi sentas ion interne, kiu kreas, ni nomu tion naturo. Estas konate, ke Azia kulturo havas konekton kun naturo, do, eble mi havis sencon de tio dekomence.*

*Mi pensas, ke okcidenta kulturo respektas memamon, kaj multaj grandaj artistoj komencas la artaĵon ĉe egoo aŭ logika koncepto kaj puŝas ĝin ĝis fina kreo. Tamen, tiuj grandaj artistoj povas krei artaĵojn, kiuj preteriras memamon kaj konceptojn –, kion mi respektas. Tiutipaj artistoj kun senco de memamo kaj inteligenteco estas tre gravaj."*

La nuna projekto/objekto de Keiko estas 'konekta' muro, kontraŭe al la komuna koncepto

de muro kiel dividilo. La ideo de la muro kreskis el la trovo de arbo-radiko, kiun oni elfosis dum konstruado. La arbo enhavis pecojn de brikoj, vitro kaj metalaĵoj. Kiam ŝi vidis ĝin, ŝi vidis metaforon por la energio de urbo; ŝi vidis la urban vivon en la arbo, kiu estis asimilita kaj fariĝis parto de tiu arbo. Ŝi savis la radikon kaj kreis projekton 'Tsunagu-radiko. Keiko sendas fragmentojn de brikoj kaj vitro el tiu radiko al personoj en aliaj urboj, tra la mondo kaj interŝanĝe, ili sendas pecon de ilia urbo al ŝi. Keiko tiam metas la pecojn en skatoletojn kaj metas ilin sur bretojn en la konekta Tsunagu-muro. Tial, la muro konektos kaj okupos la tutan spacon kaj spertojn de personoj en ĉiuj tiuj landoj, trans la naciaj limoj. La pecoj mem ne nepre gravas; la tempo el propra vivo, kiun la persono uzis por interŝanĝi la pecojn gravas – la sento de konekto, kiun la ago donas al la partoprenantoj – tio gravas.

Se vi volas partopreni, la paŝoj estas listigitaj grafike sube. Sendu retpoŝte al: tsunagukabe@news.keikomiyamori.com vian nomon, adreson, retpoŝtadreson, priskribon de via interŝanĝaĵo. Vi ricevos bileton kaj poŝtetikedon por presi kaj sendi vian aĵon. Memoru ne sendi manĝaĵon aŭ ion, kio povus putriĝi. Se vi ne volas, ke via nomo montriĝu en listo de partoprenantoj, ankaŭ inkluzivu tiun informon en la letero.

Se vi ne konas la anglan aŭ japanan lingvojn, Viola aŭ Cindy tradukos el Esperanto por vi. Nur sendu la Esperantan tekston al Viola: viola@florplena.org aŭ Cindy: cfmckee@gmail.com.
Se vi volas sendi paperan leteron, sendu viajn informojn poŝte al:
Keiko Miyamori
P.O.BOX 11771. Philadelphia, PA 19101
USA
www.keikomiyamori.com

***Intervjuo de Cindy Mckee; kunlaboro de Viola Murasaki***

